

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 622 (9)

Septembro 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

U.K. en Marseille



*Okaze de nia Kongreso en Marseille, la
urbo eldonis afiŝojn en Esperanto.*



ESPERANTO

Septembro 1957

Revuo Internacia

N-ro 622 (9)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi
respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon
(vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.).

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chia-
brera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario,
77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fille-
brook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj
aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj
asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-
Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Manifestacio en Marseille	125
La solena inaŭguro	126
La ĉefaj kulturaj aranĝoj	128
Dumkongresaj laboroj de UEA	129
Komitato de UEA — Decidoj	132
Aliaj okazintaĵoj	134
La solena fermo	136
Unika formo de muziko	140
Poemoj de Simazaki-Toŝon	141

Rubrikoj

Monda galerio	138
Niaj konkursoj	139
Radio	140
Radio-Babiloj	142
APO	143
Oficiala informilo	143
Internaciaj konkursoj	144

Serioza kaj Impona Manifestacio en Marseille

42a U.K. de Esperanto vaste kaj objektive raportita en la gazetaro

Malgraŭ la ofte prema varmega de suda Francujo, la 42a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Marseille de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1957, estis elstara pro la laboremo de la ĉeestantaj esperantistoj, kiuj entuziasme plenumis plenan programon de kulturaj kaj movadaj laboroj. Ĉeestis 1468 kongresanoj el 38 landoj, kaj moralaj aliĝoj de tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la Kongreson mem, ankoraŭ nun, dum la verkado de tiu ĉi raporto, amase enfluas en la Centran Oficejon de UEA.

El la vidpunkto de publikaj rilatoj la 42a U.K. aparte brile sukcesis. Neniam antaŭe iu nia kongreso ricevis tiel vastan atenton en la naciaj gazetoj, kaj neniam antaŭe la gazetoj tiel digne, serioze kaj objektive traktis nian aferon. Ne nur en Francujo sed ankaŭ en aliaj landoj multnombre aperis raportoj kaj fotoj, kaj tute mankis ia moka nuanco en tiuj raportoj, kian povis bedaŭrinde sugestii la naciaj gazetoj en antaŭaj jaroj, parte pro la neinformiteco, parte pro la supra sinteno de kelkaj ĵurnalistoj. Al Marseille venis, ofte proprainiciate, reprezentantoj de gravaj gazetoj en Francujo, Italujo kaj Britujo, kiuj profunde interesiĝis pri la kulturaj laboroj de la kongreso kaj ricevis bonan impreson, kiun ili poste honeste raportis. Tiun ĉi novan kaj signifoplenan sintenon ni dankas ĉefe al tri faktoroj: al la tuta nova, serioza linio de UEA dum la pasintaj kelkaj jaroj; al la bonega Gazetara Servo kiu funkciis perfekte, kun pluraj novaj fakoj, antaŭ kaj dum la kongreso; kaj al la fakto, ke tiuj ĵurnalistoj, kiuj vizitis la kongreson, estis taŭge akceptitaj kaj havis okazon intervjui informitajn kaj seriozajn esperantistojn. Laŭ nia opinio, tiu ĉi rezulto pravigas la klopodojn de UEA altigi la kulturan nivelon de la movado kaj forigi el niaj programoj tiujn erojn, kiuj povas al la ekstermovada mondo doni tute malĝustan impreson pri la graveco kaj signifo de nia afero.

Flanke de gravaj aŭtoritatoj montriĝis granda interesiĝo pri la kongreso kaj ĝiaj laboroj. S-ro René Coty, Prezidanto de la Franca Respubliko, estis Protektanto de la kongreso, kaj la Honora Komitato konsistis el 26 el la plej famaj kaj aŭtoritataj personoj en Francujo, inkluzive la Ĉefministron, tri ministrojn, kaj membrojn de la Franca Akademio. Ne nur ĉeestis la Inaŭguron pluraj Konsuloj, kiel oni povas legi sur alia paĝo de ĉi raporto, sed la svisa konsulo en Marseille kontaktis la svisajn kongresanojn kaj petis ilin montri al li la laborojn de la kongreso; kun ili li vizitis multajn aranĝojn, kaj ricevis tre bonan impreson. La kongreso ricevis salutleterojn de 7 gravaj internaciaj organizaĵoj, kiuj, kiel UEA, havas konsultajn rilatojn kun UNESKO. UNESKO mem estis reprezentita de observantino, kiu restis dum la tuta semajno.

La aranĝoj de la kongreso estis sur la sama alta

nivelo kiel en la lastaj jaroj. La Internacia Somera Universitato havis sian dekan laborperiodon, kun altkvalitaj prelegoj de kvalifikitaj personoj. La verkistoj de la Internacia Lingvo prezentiĝis pere de la Belarta Konkurso. Oni fondis du novajn fakajn organizaĵojn: La Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj (IAJE), kun pli ol cent membroj el 21 landoj; kaj la Internacia Verkista Asocio (IVA), kun 35 membroj el 17 landoj. La Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) fariĝis la unua fak-organizo, kiu transformiĝis de kunlaboranta ĝis aliĝinta Faka Asocio de UEA, kun propra Komitatano. ISAE krome plivastigis siajn kadrojn dum la kongresaj kunvenoj, kaj faris gravajn decidojn pri la estontaj laboroj de la asocio. Teatra grupo el Hispanujo prezentis sur la scenejo de la granda Operdomo en Marseille la konatan teatraĵon de Molière, „Georgo Dandin”, en la traduko de la iniciatinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof. La Akademio de Esperanto dufoje kunsidis.

La Komitato kaj Estraro de UEA multe laboris dum la kongreso, en atmosfero de amika harmonio kaj sindono al la antaŭenigo de nia afero.

La teĥnika aranĝo de la kongreso kaj de la Kongresejo estis bonega. Precipe alloga estis tio, ke en la korto de la Kongresejo troviĝis agrablaj tabletoj, ĉe kiuj oni povis sidi kun amikoj inter la laborkunvenoj, kaj ricevi manĝaĵojn kaj — en la altaj temperaturoj de Marseille tio estis speciale grava — trinkaĵojn. Tiu aranĝo multe kontribuis al la harmonieco de la semajno, kaj al la laborkapablo de la kongresanoj.

La lingva nivelo de la kongresanoj estis vere alta, notinde ankaŭ inter la multaj gejunuloj, tamen ankoraŭ troviĝis, bedaŭrinde, kelkaj neesperantistoj, kaj esperantistoj kiuj preferis paroli nacilingve al samnaciaĵoj. Ni esperu, ke jam en Mainz tiuj elementoj ne plu troviĝos en niaj vicoj. Aliflanke, la Infana Kongreseto estis 100%e esperantista, kaj niaj plej junaj samideanoj donas tiurilate sekvindan ekzemplon al pli aĝaj kongresanoj!

Aparte ĝojiga estis la ĉeesto de granda nombro de samideanoj el orienta Eŭropo, precipe el Pollando kaj Bulgarujo, kaj ĝojigaj estis iliaj raportoj pri la progreso de Esperanto en tiuj landoj. Doloro sentiĝis al ni, aliflanke, la manko de niaj amikoj el Hungarujo. Inter la kongresanoj el orienta Eŭropo elstariĝis, kompreneble, la nepo de nia Majstro, s-ro inĝ. Ludoviko Zamenhof, kiu por la unua fojo depost multaj jaroj povis viziti universalan kongreson.

La Loka Kongresa Komitato sub prezido de s-ro Honoré Bourdelon, la multnombraj sindonaj helpantoj en la diversaj servoj, kaj la Konstanta Kongresa Sekretario, s-ro G. C. Fighiera, meritas nian tutkoran dankon pro la bonega aranĝado de nia 42a Universala Kongreso.

W. A.

La Solena Inaŭguro

Dimanĉon, la 4an de aŭgusto, je la 9a30, en la bela Operejo de Marseille, komenciĝis la Solena Inaŭguro de la 42a Universala Kongreso de Esperanto. La reprezentanto de S-ro G. Defferre, urbestro de Marseille, bonvenigis la 1,418 kongresanojn el 38 landoj. La reprezentanto de la Prefekto ankaŭ bonvenigis la esperantistojn en la nomo de la francaj aŭtoritatoj.

La Prezidanto de U.E.A., Prof. D-ro Giorgio Canuto, bonvenigis la esperantistojn en la nomo de UEA, kaj dankis la Prefekton, la Urbestron, kaj S-ron René Coty, Prezidanto de la Franca Respubliko, kiu akceptis esti Honora Protektanto de la Kongreso. Prof. Canuto menciis la grandajn progresojn de la Internacia Lingvo dum la pasinta jaro, kaj substrekis la aktualan gravecon de la lingva problemo en la hodiaŭa Eŭropo kaj la hodiaŭa mondo. Li aludis ankaŭ al la laboro farita por la Internacia Lingvo, de la francaj pioniroj, Generaloj Bastien, Sébert kaj aliaj.

Post salutparolado de la Prezidanto de L.K.K., S-ro H. Bourdelon, la reprezentantoj de 11 registaroj salutis la kongreson. Por la **aŭstra** registaro s-ro Philippovich, kultura ataŝeo kaj konstanta delegito de UNESKO; por la **belga**, s-ro Remi Van Eynde, Ŝtata Konsilanto; por la **brazila**, s-ro Carlo Augusto de Carvalho e Sousa, Brazila Konsulo en Marseille; por la **dana**, s-ro Svend Dragsted, funkciulo de la Financa Ministerio de Danlando; por la **germana**, D-ro W. Herrmann, juĝisto; por la **jugoslavia**, s-ro Luka Belamaric, Ĝenerala Konsulo; por la **nederlanda**, s-ro Inĝ. J. R. G. Isbrucker; por la **norvega**, s-ro C. Støp-Bowitz; por tiu de la **Respubliko Dominikana**, s-ro Gatau; por la **sveda**, s-ro Einar Dahl, Parlamentano; por la **urugvaja**, la Ĝenerala Konsulo en Marseille.

UNESKO estis reprezentita de f-ino Bohn, de la informa fako, kiu legis leteron de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, kiu salutis la kongreson.

Salutis la kongreson reprezentantoj de la Landaj Asocioj aliĝintaj al UEA; por la **aŭstralia**, s-ro J. Hawks; por la **aŭstra**, s-ro Werner; por la **belga kaj flandra**, s-ro Van Eynde; por la **brita**, f-ino E. M. Wheatley; por la **bulgara**, s-ro Georgi Dolapĉiev; por la **dana**, s-ro E. Knudsen; por la **finna**, s-ro Hannes Koivu; por la **franca**, s-ro Llech-Walter; por la **germana**, D-ro Herrmann; por la **hispana**, s-ro Fernando Bayo; por la **itala**, D-ro Inĝ. G. Azzi; por la **jugoslavia**, S-ro I. Rotkviĉ; por la **maroka**, S-ro Ch. Thollet; por la **nederlanda**, f-ino M. H. Vermaas; por la **norvega**, s-ino M. W. Jørgensen; por la **novzelanda**, s-ro W. H. King; por la **pola**, s-ro A. Rajski; por la **sveda**, s-ino I. M. Lindkvist; por la **svisa**, s-ro B. Graf; por la **nordamerika**, s-ino B. Helmuth.

Sekvis la salutoj de la Nealiĝintaj Landaj Asocioj; por la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en Ĉeĥoslovakio parolis s-ro Vuk Echtner;

por la **Sarlanda** Esperanto Asocio, s-ino Grete Kraft; por la **Helena** Esperanto Asocio, s-ro J. Kaloumenos; kaj por **Sudafriko**, s-ro E. W. Woodruff. Reprezentanto de la Internacia Societo pri Kriminologio ankaŭ salutis la kongreson.

Inter la ricevitaj telegramoj troviĝis ankaŭ jenaj: telegramoj de s-roj Philippe kaj Privat, de rumanaĵ esperantistoj, de leningrada grupo, de Somera Kolegio en Doksy (Ĉeĥoslovakio), de la Vietnamana Esperantista Asocio, kaj de Société Européenne de Culture, Venise.

Post muzika interludo, sekvis la

Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna

La festparolado de nia fama oratoro estis inter liaj plej bonaj. Plurfoje li devis paŭzi pro la entuziasmaj kaj longedaŭraj aplaŭdoj de la esperantistaro; estis evidente, ke D-ro Lapenna esprimis la opiniojn kaj aspirojn de la multnacia kongresanaro.

Komence de sia parolado la Ĝenerala Sekretario de UEA diris:

„Kiam la vagonaro alportis min al tiu-ĉi benita peceto de la terglobo kie la suno abunde verŝas la brilantan oron de siaj radioj kaj la naturo kolorigis la ĉielon kaj la maron per lazura bluo plej intensa kaj samtempe delikata; kie la grundo naskas fruktojn sukoplenajn kaj dolĉajn, kaj kreskigas florojn la plej bonodorajn, mi pli bone komprenis kial tiu ĉi regiono estis daŭre frekventata ek de la plej antikvaj tempoj, kial jam ĉe la transiro de la 7-a al la 6-a jarcento antaŭ Kristo la grekoj elektis ĝuste tiun ĉi lokon por fondi Massalia, la urbon havontan poste brilan historion kaj fine fariĝintan unu el la plej gravaj havenoj de la mondo. Mi ankaŭ komprenis pli bone kial tiu ĉi regiono donis al Francujo kaj al la homaro la poezion de la trobadoroj kaj kial ĝuste Provenco inspiris tiom da poetoj, verkistoj, oratoroj, humoristoj, kaj pentristoj, el kiuj la nomoj de ĝiaj filoj Mistral, Rostand, Mirabeau, Daudet, Daumier, Cézanne, por mencii nur kelkajn, atingis famon mondan kaj ĝeneralan admiron.

La beleco de la naturo kaj la larĝeco de la horizontoj fandiĝadis ĉi tie dum jarcentoj kun la boneco de la animo, kun la nobleco de la penso kaj kun spirito praktike entreprenema en harmonian tuton.

Ni estas feliĉaj, ke nia ĉijara kunveno okazas en tia medio kaj mi estas certa, ke mi interpretas viajn sentojn, se mi antaŭ ĉio esprimas omaĝon al Marseille kaj al Provenco, kaj se mi dankas al niaj geamikoj ĉitieaj kaj al la aŭtoritatoj, kiuj ebligis kaj helpis ke la laboroj de nia Jubilea Kongreso, tiu elstara kultura manifestacio kaj labora aranĝo, kiu solvos multajn praktikajn demandojn — okazu en tiu ĉi lulilo de poezio kaj artoj, kiu same tiel estas gravega komerca centro.

Nia kongresurbo altrudas komparon. La histo-

rio de Marseille estas ligita al la maro. Maristoj ĝin fondis, maristoj ĝin kreskigis; la maro estis dum ĝia historio la bazo de ĝia florado kaj potenco. Sed la maro per si mem ne estis ĉiam amika. Ĝi — same kiel vastaj dezertoj, altegaj montoj, profundaj netraireblaj arbaroj — disigis iam la homojn unujn de la aliaj. Estas la homo, kiu per la forto de sia volo kaj per la kapablo de sia intelekto, kreante ĉiam pli taŭgajn kaj pli perfektajn rimedojn de surakva trafiko, subigis la maron, faris el malamiko amikon, transformis senbridan mastron de disigo en humilan servanton de kunligo.

La lingvo, la multeco kaj diverseco de lingvoj, estas same tiel obstaklo — eĉ pli granda ol la plej larĝaj oceanoj — al interhoma komunikado en mondaj kadroj. Ĝi estas, kiel Voltaire prave diris, la plej granda malfeliĉo de la homaro. Sed homogenia kaj persista — talento kaj diligento ĉiam gepatras la sukceson — trovis la solvon al tiu malbono, kaj ni aliaj, ni kiuj akceptis lian majstran verkon kaj transformis la projekton en vivantan lingvon, montris per praktika uzado dum precize 70 jaroj, ke la lingva obstaklo povas esti venkita; ke la lingvo povas esti metita en la servon de la homo ankaŭ en tutmonda amplekso. Tiu ĉi fakto — la naskiĝo kaj vivigo en la praktiko de la Internacia Lingvo — estas unu el la plej elstaraj eventoj en la kultura historio de la homaro. Ĝi malfermas novajn perspektivojn por grandskala kultura evoluo kaj prezentas senfinajn eblecojn de plua praktika utiligo en internaciaj rilatoj.”

En la daŭrigo de sia parolado Prof. Lapenna analizis koncise la kaŭzojn de la sukceso de Esperanto. Li akcentis, ke antaŭ Zamenhof multaj klopodis trovi solvon al lingva ĥaoso kaj ke ankaŭ post la publikigo de la verko de Zamenhof pluraj denove serĉis rimedon al la lingvaj obstakloj, ne komprenante, ke la solvo jam estas trovita. El ĉiuj projektoj de komuna lingvo nur unu — la Internacia Lingvo de Zamenhof — transformiĝis en ĝis maksimumo perfektan instrumenton de pensado kaj komunikado ĉefe pro jenaj kaŭzoj:

Unue tial, ĉar Zamenhof bone komprenis ke Internacia Lingvo devas esti internacia ne nur laŭ la nomo, sed ankaŭ laŭ sia interna strukturo. Aliflanke li prave deziris ke la Lingvo estu kiel eble plej facila. Pro tio estis necese ordigi kaj sistemigi tiun internacian Lingvo-materialon, kiun kreis la homa socio en la daŭro de sia evoluo. La aglutina karaktero konsiderinde faciligas la lernadon kaj proksimigas ĝin al tiuj popoloj, kies lingvoj havas aglutinan strukturon. Pro tio Esperanto estas pleje internacia, ne el vidpunkto de tiu aŭ alia popolo, aŭ grupo da popoloj, sed el vidpunkto monda.

Due, la lingvo estis ek de la komenco kaj fariĝis ĉiam pli kaj pli internacia ankaŭ el la vidpunkto de sia socia portanto. Zamenhof diris „Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia”.

Sed en la kazo de Esperanto tiu socia portanto ne estas unu nacio aŭ unu socia tavolo, sed kolektivo konsistanta el apartenantoj de ĉiuj nacioj kaj de ĉiuj sociaj tavoloj. Ek de la komenco Zamenhof forcedis ĉiujn personajn rajtojn je la lingvo; kaj lasis la pluan evoluon de Esperanto al la lingvuzantoj, al la popolo mem. Tiu demokrateco faris, ke ĉiuj esperantistoj ĉiam sentis la lingvon kiel sian propran kaj ne kiel ian fremdan lingvon. Se oni ĵetas nur supraĵan rigardon al la evoluo de la Internacia lingvo en la pasintaj sepdek jaroj, oni facile konstatos kiel grandega kaj multflanka ĝi estis kaj oni kun fiero rimarkos, ke hodiaŭ Esperanto posedas esprimeblecojn multrilate transparentajn tiujn de la naciaj lingvoj, eĉ de la plej evoluintaj kaj plej riĉaj.

Trie, Esperanto estas karakterizita de la internacieco de la celo, al kiu ĝi servas: ĝi ne povis esti kaj ne estas instrumento de spirita superregado de unu popolo aŭ de grupo da popoloj super la aliaj, sed ilo de interhoma komunikado en mondaj kadroj kaj en la intereso de la tuta homaro. Esperanto konkretigas la ideon de plej nobla humanismo kaj de vera internaciismo, kiujn Zamenhof mem enspiris en la lingvon ek de ĝia naskiĝo. Tiu humanisma internaciismo estas hodiaŭ praktikata en sia plej pura formo nur en la Esperantismo.

La menciitaj tri aspektoj de internaciismo — interne struktura, laŭ la socia portanto kaj laŭ la celo — donas plenan signifon al la nomo mem de la lingvo kaj al la fama moto, presita sur la kovrilpaĝo de la unua lernolibro: „Por ke lingvo estu tutmonda ne sufiĉas ĝin nomi tia”.

* * *

En la fino de sia parolado la oratoro tute mallonge prezentis la nunan staton de Esperanto en la mondo kaj emfazis la fakton, ke post multaj jaroj la Esperanto organizaĵoj estas permesitaj en ĉiuj landoj kun la escepto de nur tri. Li esprimis la ĝojon de la tuta esperantistaro, ke la jubilea kongreso okazas en tiel favoraj kondiĉoj; kiuj estas promesoplenaj por la estonteco. Tio kompreneble ne signifas, ke finiĝis la periodo de konsciaj klopodoj de la organizita Esperanto-Movado kaj ke jam venis la tempo, kiam la afero per si mem plue ruliĝos. Tiu periodo certe estas ankoraŭ sufiĉe malproksima. La atingitaj sukcesoj de la lastaj jaroj donu al ĉiuj novan inspiron, plian kuraĝon kaj energion, por ke ni povu per ankoraŭ pli grandaj paŝoj proksimiĝi de tago al tago, de jaro al jaro al tiu idealo, kiun ni ĉiuj celas: ke ĉiuj homoj ekuzu por siaj internaciaj rilatoj lingvon komunan, neŭtrale homan, kies plena akcepto donos ne antaŭvideblajn utilojn al la tuta homaro kaj samtempe estos la plej efika garantio por konservi kaj plua evoluo de la naciaj lingvoj.

* * *

Post la festparolado, la Solena Inaŭguro finiĝis per komuna kantado de „La Espero”.

La Ĉefaj Kulturaj Arangoj

Internacia Somera Universitato

Dimanĉon vespere la 10a Laborperiodo estis inaŭgurita de la nunjara Rektoro, **Prof. G. Waringhien**, kaj tuj post liaj enkondukaj vortoj okazis la unua prelego. **Prof. D-ro Ivo Lapenna** parolis al vasta ĉeestantaro pri „La suvereneco kaj la federacia principo”. Li unue donis historian skizon pri la koncepto de suvereneco, kaj poste diskutis diversajn nuntempajn konceptojn de suvereneco, inkluzive la nazian kaj la sovetan, kaj suverenecon en kunligo kun la ideoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Tute speciale li turnis sian atenton al la problemo de suvereneco en federacia ŝtato.

Lundon matene, **Prof. D-ro Hugo Sirk**, (Aŭstrujo), prelegis pri „La uzo de radiokarbono por la determino de la aĝo de organikaĵoj”.

Mardon okazis du prelegoj. Matene **D-ro Ivo Rotkvic** (Jugoslavio) parolis pri „Esperanto kaj literaturo”. D-ro Rotkvic emfazis la valoron de literaturo por la lingvo, al kiu la verkistoj helpas doni animon. Li substrekis la aŭtonomecon de la verkisto; la kreo de artverko, li diris, estas evolua proceso en la menso de la verkisto. Vespere, **Mag. William Auld** (Skotlando) prelegis pri „Internaciaj aspektoj de la anglalingva poezio de la 20a jarcento”. Laŭ la oratoro, kelkaj gravaj poetoj, interalie Ezra Pound, T. S. Eliot kaj Hugh Macdiarmid, klopodis krei specon de mondkulturo en la angla lingvo; ilia relativa malsukceso reprezentas ankoraŭ unu pruvon, ke la angla lingvo ne taŭgas kiel mondlingvo. Nia Esperanto kulturo, kvankam ankoraŭ tre juna, jam nun enhavas pli da internacieco ol iu ajn alia.

Merkredon matene **Lekt. Marjorie Boulton**, (Anglujo) konata poetino esperantista, prezentis „Enkondukon en la internacian semantikon”. Inter alie ŝi donis ekzemplojn de la problemoj kaŭzitaj per simileco inter vortoj en du lingvoj, kiuj tamen ne posedas la saman semantikan enhavon. Aparte laŭdirinde estis, ke f-ino Boulton spicis sian kleran prelegon per vere trafaj spritaĵoj, kaj la ĉeestantaro tion tre alte taksis. Tuj post la prelego de f-ino Boulton, **Lekt. C. Støp-Bowitz** (Norvegujo) pritraktis „La parencecon inter vertebruloj”. Zoologoj kutime grupigas la vertebrulojn laŭ 5 klasoj: fiŝoj, amfibioj, rampuloj, birdoj, mamuloj; sed paleontologoj konstruis novan grupigon, en kiu centran pozicion tenas la t.n. „krospterikaj” fiŝoj. Oni longe supozis tiun grupon elmortinta, sed antaŭ kelkaj jaroj sensacie oni trovis t.n. „vivantan fosilion”, vivantan krospterikon, kaj poste aliajn ekzemplojn de tiu interesa besto.

La lasta prelego de la nuna jaro okazis vendredon, kiam **Prof. D-ro Giorgio Canuto** parolis pri „Tio, kio postrestas el la teorioj de Cesare Lombroso”. Tuj de la komenco la teorioj de Lombroso estis vigle kaj kelkfoje akre kontraŭstarataj. Tamen, malgraŭ kelkaj flankaj eraroj, la kerno de

tiuj teorioj restas ankoraŭ hodiaŭ valida kaj signas la elirpunkton de ĉiuj modernaj studoj pri Kriminologio.

Menciinde estas, ke en la Kongreslibro aperis listo de la prelegantoj kaj prelegoj de la unuaj naŭ laborperiodoj. Tiu ĉi impona listo de 84 prelegoj pri 26 fakoj, de 41 universitataj profesoroj, lekto-roj kaj alte kvalifikitaj esperantistaj fakuloj donas tre klaran bildon pri la graveco kaj seriozeco — por ne diri: unikeco — de la Internacia Somera Universitato.

Enlandaj prelegoj

Specialaĵo de la 42a U.K. estis la okazigo de du enlandaj prelegoj. S-ro H. Bourdelon, senlaca prezidanto de L.K.K. prelegis pri „Tri fondintoj de l' 'Felibrige': Roumanille, Mistral kaj Aubanel”. S-ro Bourdelon estas konata aŭtoritato pri la provenca lingvo kaj ĝia literaturo, kaj li enkondukis siajn aŭskultantojn, por kiuj ĝi estis ĝenerale tute nova tereno, en tiun profunde interesan temon.

F-ino Colette Llech-Walter prelegis pri „La ekzistencialismaj 'herooj' en la verkaro de Jean-Paul Sartre”. Difininte unuflanke la ekzistencialismon, t.e. la filozofian sistemon de Sarte, kaj aliflanke la tro naive simpligitan bildon famigitan de la keloj inter la junularo, ŝi skizis akcepteblan penetraĵon de la ekzistencialisma vivo, per lerta analizo de kelkaj el la famaj herooj en la verkoj de Sartre.

Belarta Konkurso

Merkredon, en la granda salono Zamenhof, okazis la prezentado de la nunjara Belarta Konkurso. Ĉar la Sekretario, D-ro Szilagyi, pro malsano ne sukcesis atingi la kongreson, prezidis la kunvenon Prof. G. Waringhien, membro de la juĝkomisiono. Estis juĝitaj 61 konkursaĵoj el jenaj 16 landoj: Anglujo, Aŭstralio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Meksikio, Nederlando, Norvegujo, Skotlando, Sudafriko, Urugvajo kaj Venezuelo. Kvankam la nombro da konkursaĵoj estis malpli alta ol en la pasinta jaro, tamen sur la fono de la ĝenerala florado de la Esperanto-literaturo oni povas konsideri la malpliigon simpla hazardo. La ĝenerala kvalito ne malaltiĝis; tute diletantaj konkursaĵoj estis pli maloftaj ol antaŭe. En sia raporto, D-ro Szilagyi skribis sian dankon, ne nur al la kontribuintoj kaj komisionanoj, sed ankaŭ al la Estraro de UEA, kiu tiel volonte jam dum jaroj akcelas la aferojn de la Belarta Konkurso, kaj tute speciale al la peranto, s-ro K. Lawrence (Birmingham), kies preciza laboro donas firmecon al la administrado de la konkursoj.

La Komisiono aljuĝis jenajn premiojn:

Originala prozo: 1) „Fremdeco” de Marjorie Boulton; 2) „Vekiĝo” de Edwin de Kock; 3) „Fenikso” de Marjorie Boulton.

Originala drameto: 1) „Vaka seĝo” de Marjorie

Boulton; 2) „Virino sur la landlimo” de Marjorie Boulton.

Originala poezio: 1) „Ĉe l' bordo de l' rivero” de J. de Oyarzabal; 2) „Marista kanto” de W. Auld; 3) „Venuso kaj Vulkano” de Marjorie Boulton.

Traduka poezio: 1) „Inania verba” de O. Bilas, en traduko de Geraldo Mattos; 2) „La ĉemizo-kanto” de Thomas Hood, en traduko de W. Auld; 3) „Fiat nox” de Leconte de Lisle, en traduko de G. Mattos, kaj „Sonateto” de R. Dario, en traduko de J. de Oyarzabal (juĝitaj egalaj).

Por la **Kongreslanda branĉo** (Tasko: „Odo al la suno” de Rostand) venis nur unu konkursaĵo, tiu de Enrico Dondi. En tiu ĉi branĉo la Komisiono ne aljuĝis premion.

Krom la menciitaj aŭtoroj la komisiono laŭde menciis s-inon H. Lerdung pro la rakonto „La plej granda potenculo” (prozo); s-ron W. Auld pro „La fikcia universo” (prozo); s-inon C. C. Guglielminetti pro la originala poemo „Vivo perdita”; s-ron J. Korinek pro originala poemo „Mi scias jam”; kaj f-inon W. M. Smit pro originala poemo „Kanto de kandelo”. En la traduka branĉo laŭditaj nomoj estis s-ro H. Friden (tradukoj el la norvega); s-ro Hans Amund Rosbach (Ibsen: Brand); s-ro E. Dondi pro la traduko el Ariosto „Kloradina kaj Medon”.

Post la anonco pri la rezultoj, f-ino Boulton (kies kvinopa premiigo vekis la entuziasman aplaŭdon de la ĉeestantaro) kaj s-ro Auld legis el siaj premiitaj verkoj. Verkojn de neĉeestantaj premiitoj legis s-ino E. Lapenna, s-ro R. Bernard kaj s-ro G. Waringhien.

Teatra Vespero

F-ino Marjorie Boulton, laŭ peto de nia redakcio, raportas:

La Teatra Vespero komenciĝis malbone, sed poste montriĝis kiel valora, digna kaj ĝuinda arta manifestacio. Laŭ la Kongreslibro, ĝi devis komenciĝi je la 20.00: nur je la 20.00 oni eĉ malfermis la pordojn de la Operejo; nenio okazis sur la scenejo ĝis la 20.40! (Tamen eĉ tiam niaj ŝajne neforigeblaj malfruemuloj lastmomente stumblis al siaj sidlokoj.)

Tiam, bela artpapilio subite ekflugis el la kri-zalido de tedo: sinjoro Flego Srĝan rolis kiel Ivan Ivanoviĉ Njnhin en la monologo de Ĉekov: „Pri la malutilo de la tabako”. Kun masko de ŝminko kaj grizaj haroj, tiu simpatia juna aktoro aliformiĝis en malbelan malfeliĉan maljunulaĉon. S-ro Srĝan sukcesis plene elmontri ne nur la komikecon de la ĉekova rolo, sed la psikologian subtilecon. Polurita, multifaceta juveleto!

Laŭ mia opinio, iu eraris, prezentante la ĉefdramon, precipe post la 40-minuta malfruiĝo, per dekminuta, tre prelegeca kaj iom plata prologo.

Eble oni volis soifigi nin per salita biskvito, por ke ni pli entuziasme trinku la bonan vinon de la dramo mem.

„Georgo Dandin” estas en si mem tre amuza, vere teatreca komedio, facile komprenebla; la traduko de Zamenhof estas tipe eleganta; la trupo el Barcelona bone ludis la dramon. Aŭdebleco (ĉiam problemo en tiel granda teatro) ŝajne etendiĝis multe pli malproksimen ol dum la Teatra Vespero en Kopenhago.

Ĉiuj geaktoroj aktoris konstante, eĉ dum silentoj, verve, kaj inteligente. Francisc Vilà en la longa titolrolo meritas apartan laŭdon; li ne nur ludis tiun rolon, sed reĝisoris la tutan dramon. Pablo Claramunt, kiel la nobela bopatro de Dandin, ankaŭ meritas specialan mencion. Sed ĉiuj, bonege maskitaj kaj vestitaj, videble tre bone ekzercitaj, ludis kun kvazaŭprofesia zorgemo kaj lerteco. Ili tre bone kunlaboris kiel trupo, ĉiam helpante unu la aliajn; kaj, kvankam la provludoj devis okazi en Hispanujo, ili kondukis kvazaŭ ĉeĥeje en la nekonata Operejo.

La virinoj parolis Esperanton iomete hispanece; sed la plej fortaj kritikoj kiujn mi aŭdis pri tiu eta manko venis de grupo kiu parolis itale kaj grupo kiu parolis france dum nia Teatra Vespero! Mi dubas ĉu la kaldrono rajtas multe riproĉi la kaserolon pro fulgomakuloj!

Oni ŝajne devas danki la stabon de la Operejo mem pro la vere bela dekoracio kaj la lumoj; tre ĉarma, kolorriĉa sunleviĝo freŝigis niajn okulojn je la fino.

Per tiu ĉi vespero, multe pli bona ol la Teatra Vespero ĉe la antaŭa Kongreso, ĉiuj povis ekscii: 1) ke esperantistaj geaktoroj multe pli kapablas por tiaj vesperoj, ol eĉ profesiaj geaktoroj kiuj nur supraĵe komprenas Esperanton; 2) ke vere zorga preparado povas krei poluritan prezentadon en la kadro de nia ankoraŭ iom tro diletantema movado; kaj 3) ke brulsufoke varma vespero ne tre helpas al geaktoroj, ĉar multaj plendoj pri neaŭdebleco estis ŝajne kaŭzitaj per la necesaj movoj de anhelanta aŭdantaro en la bakforna Operejo!

Dumkongresaj laboroj de U.E.A.

La laboroj de UEA okazis en du ĝeneralaj kunvenoj, en tri sekcioj traktantaj la kongresajn temojn, kaj en kunsidoj de la Estraro kaj Komitato dum la tuta semajno.

LA ĜENERALAJ KUNVENOJ

La unua ĝenerala kunveno de UEA okazis lundon, 5an de aŭgusto, sub prezido de Prof. G. Canuto, Prezidanto de UEA. Post enkondukaj vortoj de la Prezidanto, la kunvenon salutis reprezentantoj de diversaj esperantistaj organizaĵoj, kaj oni laŭtleĝis skribajn salutojn de aliaj. Letero de Ludoviko Zamenhof informis, ke li alvenos en Marseille la venontan tagon.

La temo de la kunsido estis la Estrara Raporto pri la laborperiodo 1956-'57, kiun ĉiu kongresano ricevis kun siaj kongresaj dokumentoj. La Ĝenerala Sekretario de UEA, Prof. D-ro Ivo Lapenna, donis mallongajn klarigojn pri la diversaj ĉapitroj de la raporto. Li menciis interalie la gravecon de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kiu eldonas sennombrajn dokumentojn regule sendatajn al diversaj internaciaj organizaĵoj, kaj akcentis la neceson daŭre subteni CED morale kaj materie por ke ĝi povu daŭrigi sian laboron. La Ĝenerala Sekretario plue informas pri la nova eldona aktiveco de UEA; antaŭ la decembraj festotagoj aperos la unua volumo de Angla Antologio, kiun oni povas jam nun antaŭmendi je favora prezo.

Enkondukante la diskuton, Prof. Lapenna insistis petis, ke oni publike aŭdigu kritikon pri la laboro de UEA, por ke la Estraro povu tuj respondi. En la diskuto partoprenis kongresanoj el 11 landoj; kelkaj esprimis laŭdon al la Estraro, kaj entute oni povis konkludi, ke la membroj estas kontentaj pri la Raporto kaj pri la laboroj de la Asocio.

La dua ĝenerala kunveno okazis vendredon sub prezido de D-ro Herrmann. La prezidantoj de la tri kongresaj sekcioj, S-ro D. Kennedy, D-ro Lapenna kaj S-ro Petit, raportis pri la laboroj kaj konkludoj de la sekcioj. Pluraj fakaj asocioj ankaŭ

raportis al la kunveno pri siaj dumkongresaj laboroj. F-ino Parson, helpantino de Lic. Tibor Sekelj en la ĝisnunaj laboroj de Agado en Proksima Oriento (APO), raportis pri la spertoj de APO; ŝi atentigis, ke la tereno en Hindujo estas tre vasta, kaj ke la laboro estas granda. Vere grava malhelpo en la laboroj de APO estas manko de lernolibroj, kaj ŝi urĝe petis la helpon de ĉiuj por forigi tiun mankon. S-ro G. C. Fighiera raportis pri la sukceso de la 2a Infana Kongreseto. S-ro Günther Becker, Prezidanto de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), raportis pri la nova statuto de TEJO kaj pri la 13a Internacia Junular-kunveno en Villeneuve-lez-Avignon.

En la fino de la kunsido D-ro Lapenna atentigis, ke ankaŭ dum la 42a U.K., bedaŭrinde, kelkaj kongresanoj ankoraŭ ne komprenis la neceson veni akurate al la diversaj kunvenoj, kaj kelkaj malĝentile interrompis la prelegojn en I.S.U. k.a. per sia malfrua kaj ne diskreta alveno. Li plue kritikis tiujn ankoraŭ tro multajn spertajn esperantistojn, kiuj en Esperanto-Kongreso parolas nacilingve inter si, kaj tute speciale li diris, ke tiuj, kiuj eĉ ĉe la kongresaj ĝiĉetoj postulas informojn en nacilingvo — ĉar verŝajne ili Esperanton tute ne posedas — ne estas dezirataj en niaj kongresoj. La fortaj aplaŭdoj pruvis, ke la laborantaj kongresanoj tute konsentis.

Laboro de la Sekcioj

La temo de la unua sekcio estis: **Esperanto en la Edukado**. La sektion prezidis s-ro Kennedy (Britujo), kiu akcentis la rolon de la Internacia Lingvo por edukado al internacia kompreniĝo.

S-ro Dahl (Svedujo) legis raporton de s-ro Malmgren, kiu ne povis ĉeesti. Tiu raporto substrekis la rolon de Esperanto kiel helpilo por pli facila lernado de fremdaj lingvoj. La nuna stato de instruado de Esperanto en la diversaj landoj estas esperiga; dum la aŭtuno de 1958 komenciĝos pluraj oficialaj provinstruoj en diversaj landoj.

S-ro Erbetta (Svisujo) raportis pri la infangazeto „Grajnoj en Vento”. Po 20 klasoj el diversaj landojn kontribuas al komuna cirkulera gazeto eldonita je ĉirkaŭ 25 ekzempleroj. Tiel oni vekas multflankan intereson de la infanoj; ili verkas mem raportojn, desegnaĵojn, ktp. S-ro Erbetta atenti-



La Prezidanto de UEA, Prof. G. Canuto, parolas ĉe la Inaŭguro de la 42a Universala Kongreso.

gis pri eta ekspozicio kaj menciis la interŝanĝon de sonbendoj.

S-ro Delagneau legis raporton de forestanta D-ro Albault, pri ebloj kaj efikoj de internacia kontakto inter edukistoj. Estis menciita „Universala Legolibro”. La raporto substrekiis la gravan rolon de ILEI kaj la valoron de kontaktoj kun aliaj internaciaj instruistaj organizaĵoj. Ekde januaro 1958, la „Internacia Pedagogia Revuo” aperos laŭ ses kajeroj po 16 paĝoj, kiel inda gazeto. Abonantoj ricevos senpage la tri lastajn numerojn de la jar-kolekto 1957.

Inter la deziroj, menciinda estas la deziresprimo pri apero de araba gramatiko de Esperanto.

La temo de la dua sekcio estis: **La Internacia Lingvo en Scienco kaj Tekniko**, kaj prezidis Prof. D-ro Ivo Lapenna. La sekcio diskutis la ĝisnunan utiligon de Esperanto en scienco kaj tekniko, kun ĉefa rilato al la aldono de esperantlingvaj tradukoj al artikoloj nacilingvaj, al starigo kaj organizado de pluaj fakaj societoj aliĝontaj al UEA, kaj al fakaj vortaroj. La sekcio akceptis jenan rezolucion:

La Dua Sekcio „La internacia lingvo en scienco kaj tekniko” de la 42a Universala Kongreso de Esperanto, en sia kunveno de la 6a de aŭgusto 1957, kiun ĉeestis 250 personoj el 21 landoj, decidis fari jenajn rekomendojn kun la celo disvastigi la uzon de Esperanto en la scienco kaj tekniko:

1. ISAE revivigu la tradukan servon;
2. La landaj sekcioj de ISAE aŭ unuopaj membroj de ISAE en landoj sen landa sekcio, faru bibliografion de sciencaj verkoj kaj studoj, aperintaj en Esperanto, en la koncerna lando, laŭ la modelo de la japana bibliografio;
3. La sekcio atentigas pri la graveco de la fakaj Esperanto-organizaĵoj, kaj tre rekomendas al ĉiuj esperantistoj-fakuloj aliĝi al sia faka organizo;
4. La esperantaj organizaĵoj fakaj fariĝu sekcioj de ISAE kaj instigu siajn membrojn aliĝi individue al ISAE;
5. La malfortaj fakaj organizaĵoj eldonu almenaŭ bultenon por kontaktigi sian membraron;
6. Ĉiu sciencisto kaj fakulo, individua membro de UEA, fariĝu fakdelegito por sia fako.
7. La esperantaj fakaj organizaĵoj aliĝu al la plej grava samfaka neesperantista organizaĵo, kaj instigu siajn membrojn aliĝi individue al ĝi kaj partopreni la internaciajn fakajn kongresojn kie ili ekuzu Esperanton.



Parto de la kongresanaro ĉe la Inaŭguro en la Operdomo

La temo de la tria sekcio estis: **Esperanto en Komerco kaj Turismo**, kaj prezidis s-ro Petit (Francujo).

La raportanto, s-ro J. Thierry (Francujo), faris enketon en hoteloj, restoraciejoj kaj vojaĝagentejoj pri esperantistaj deĵorantoj en tiaj lokoj; ili estas malmultaj, ĉar la hotelestroj emas uzi la lingvojn de siaj klientoj. Tamen, s-ro Thierry kaj aliaj ĉeestantoj citis kelkajn efikajn ekzemplojn. Li poste rekomendis, ke oni ĉiam pli uzadu la lingvon internacian por konkretaj celoj.

Ne estis eble restarigi fakan asocion pro la neĉeesto de profesiaj fakuloj.

La sekcio unuanime akceptis du resoluciojn:

Rezolucio 1-a. La komerca kaj turisma sekcio de la 42a Universala Kongreso de Esperanto en Marseille, konsiderante la memkompreneblan fakton, ke la komerca medio taksas iun lingvon, ne laŭ ties kvalitoj, sed laŭ la profitodona uzebleco, — konkrete, laŭ tio, se ĝi ricevas leterojn skribitajn en la koncerna lingvo —

1-e, revokas en la memoron de ĉiuj Esperantistoj tra la mondo la nepran evidentajon, ke ili rekte skribu alilandan korespondadon komercan kaj turisman en Esperanto, kaj ke ili same uzu la lingvon dum vojaĝo; nur okaze de nerespondo al unua letero ili skribu al la delegito de UEA, kiu tiam kaj nur tiel havos praktikan rimedon utile interveni kaj sur komerca bazo montri la valoron de Esperanto;

2-e, alvokas al ĉiuj delegitoj kaj grupoj de UEA, por ke ili organizu turisman fakon kun jenaj taskoj: listigi la esperantistajn komercistojn en sia urbo, laŭ la imitinda ekzemplo

de Amsterdam; doni komercajn informojn anstataŭ plenumi similajn komisionojn; interveni ĉe komercistoj pri leteroj restintaj sen respondoj aŭ bezonantaj tradukon.

Rezolucio 2-a. La komerca kaj turisma sekcio de la 42a Universala Kongreso de Esperanto en Marseille atentigas ĉiujn komercajn ĉambrojn pri la fakto, ke la Lingvo Internacia Esperanto estas la sola formo de „dulingvismo” sen risko de intermiksado, kaj, krome, la precizega rimedo lingva, kiun nepre pli kaj pli bezonas la internaciaj rilatoj komercaj.

Jam en 1920–1923 la eksperimentoj de s-ro Baudet, tiama Prezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro, elmontris kun plena evidenteco la precizecon kaj taŭgecon de la Lingvo Internacia (pli grandan tradukfidelecon ol per iu ajn alia lingvo).

La 10an de decembro 1954, la plej elstara Internacia Organizaĵo pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO) agnoskis la taŭgan valoron de Esperanto por la interpopolaj rilatoj.

En tia kriza tempo, kiam ĉiujn naciajn lingvojn kaj kulturojn ekminacas danĝera intermiksigo (jam fonto de miskomprenoj kaj malprecizigo), la Komercaj Ĉambroj plej favore apogu la instruadon de Esperanto en la Komercaj Lernejoj, kaj ĉiurimede subtenu la disvastigadon de Esperanto en la komerca mondo.

KOMITATO DE U.E.A. — DECIDOJ

La Komitato laboris en kvar komisionojn: 1) Ĝeneralaj Aferoj, Elektoj, Kongresoj, Landaj kaj Fakaj Asocioj, Kulturaj Problemoj; 2) Administrado, Financoj, Budĝeto 1958; 3) Jarlibro, Revuo, Literatura Suplemento, Eldona Fakoj; 4) Eksteraj Rilatoj, Informado, CED. La komisionoj raportis pri siaj laboroj al la plena Komitato, kiu surbaze de tiuj raportoj faris siajn decidojn.

La Komitato akceptis la Raporton de la Estraro, kiun ĉiu kongresano ricevis en presita formo kun la aliaj kongresaj dokumentoj.

Post plena diskutado pri la financa situacio en UEA, kaj konsiderante ke la prezoj tra la tuta mondo jam dum pluraj jaroj daŭre altiĝadis, la Komitato decidis altiĝi ĉiujn kotizojn de la Asocio, escepte tiun de la AM, je 25 % ekde januaro 1958. Ĝi konstatis, ke la ĝisnunaj kotizoj tute ne kovras la ĉiam pli vastajn servojn, kiujn la Asocio donas al siaj membroj, kaj ke la plialtiĝo de ĉiuj prezoj devigas la Asocion, aŭ redukti la disponigatajn servojn, aŭ altiĝi la kotizojn. En la nunaj pli favoraj por Esperanto cirkonstancoj en la mondo, la Komitato opinias, ke estus grava eraro redukti la servojn, kiujn la Asocio donas. La Komitato ankaŭ akceptis la budĝeton por 1958 de la Asocio, kiu, laŭ ĝia opinio, estas eble la plej realeca budĝeto iam ajn proponita por UEA. La budĝeto 1958 antaŭvidas 90.000 gld. da elspezoj kaj da enspezoj. La Komitato esperas, ke malgraŭ la pli altaj kotizoj daŭre aliĝos ĉiam pli multe da novaj membroj al UEA, kaj ke la malnovaj membroj ne foriros.

La Komitato elektis unuanime tri novajn Komitatanojn C: s-ro Günther Becker (Sarlando); s-ino Emilija Lapenna (Jugoslavio); kaj s-ro Jean Thierry (Francujo). Ĝi elektis ankaŭ la kontrolantojn de la kaslibroj de la Asocio.

La Komitato unuanime akceptis Urugvajan Esperanto-Asocion kiel aliĝintan landan asocion de

UEA. Urugvaja Esperanto-Asocio rajtos havi observanton en la Komitato de UEA.

La Komitato akceptis la peton de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), ke ĝi transformiĝu de kunlaboranta al aliĝinta faka asocio de UEA. ISAE estas la unua fakasocio, kiu tion faris. Kiel Komitatano A por ISAE estis elektita Prof. Popovic.

La Komitato diskutis la raporton de s-ro E. Malmgren pri „Esperanto kiel bazo por lernado de fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj”. Ĝi konstatis, ke s-ro Malmgren bone kaj sukcese laboras, kaj ĝi instigas lin daŭrigi tiujn laborojn.

La Komitato aprobis la Statuton de Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo.

La Komitato, konstatinte ke en la oficiala revuo ne estas disponebla sufiĉe da spaco por literaturaj kaj belartaj artikoloj, kaj dezirante apogi tiun gravan flankon de la esperantista agado, decidis eldoni en 1958 belartan almanakon. Tiu almanako, kiu estas eldonota antaŭ pasko 1958, estos samformata, sampapera kaj samaspekta kiel la organo de la Asocio, enhavos proksimume 70 paĝojn, kaj estos iasence aldono al la organo; sed ĝi estos aparte mendebla, ankaŭ de esperantistoj, kiuj ne estas abonantoj de la revuo „Esperanto”.

La Komitato diskutis la invitojn por la Universalaj Kongresoj en la venontaj jaroj. Ĝi rilatis favore al la proponoj pri Varsovio en 1959 kaj Barcelona en 1960, sed ĝi akcentis, ke tiu favoro povas esti nur principa, kaj ke la definitivon decidon faros la Estraro en sia kunsido dum pasko, 1958. Povas esti, ke ankaŭ aliaj invitoj por 1959 estos ricevataj antaŭ la fino de 1957, kaj estos necese preni tiujn en konsideron.

Kunvenoj de Fakaj kaj Neneŭtralaj Organizaĵoj

Fondiĝis dum la kongreso du novaj fakorganizaĵoj esperantistaj. Kunveno de 17 juristoj el 9 landoj fondis la **Internacian Asocion de Juristoj-Esperantistoj**. La kunveno akceptis la Statuton de I.A.J.E., fiksas la kotizon je unu dolaro jare, kaj elektis jenan Plenuman Komitaton: Prezidanto, Prof. D-ro I. Lapenna (Londono); Vicprezidantoj, D-ro W. Herrmann (Germanujo) kaj R. Sadowicz (Pollando); Sekr. Kasisto, S-ro Jean Duthilleul (Francujo). La Prezidanto informis, ke ĝis nun pli ol cent juristoj-esperantistoj el 21 landoj esprimis deziron aliĝi al la Asocio. La kunveno faris jenajn konkludojn:

1. rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj de UEA kaj tuj fariĝi fak-delegitoj pri juro laŭ la statuto kaj regularo de UEA.
2. aliĝi la asocion al ISAE kiel sekcion kaj rekomendi al ĉiuj juristoj esperantistoj fariĝi individue membroj de ISAE.
3. aliĝi la Asocion, kiel sekcion al „International Law Association” kaj rekomendi al ĉiuj juristoj esperantistoj

aliĝi kiel individuaj membroj al la naciaj sekcioj de tiu internacia asocio de juristoj. En unu el la sekvantaj jaroj la I.A.J.E. organizos grandskalan partoprenon de juristoj-esperantistoj ĉe la jara kongreso de International Law Association.

4. La kunveno atentigas ĉiujn internaciajn kaj landajn Esperanto-organizaĵojn, ke la IAJE kaj ĝiaj membroj estas je ilia dispono por konsultiĝo en ĉiuj juraj aferoj, kiujn tiuj organizaĵoj renkontos en sia laboro. Ĝi rekomendas al la Esperanto-organizaĵoj konsulti juristojn-esperantistojn en juraj problemoj, kiujn ili renkontas.
5. La kunveno opinias, ke estus necese eldoni modernan juran terminaron, kaj komisiis d-ro J. R. Vivas esplori la problemon kaj raporti al la sekvanta kunveno.
6. La kunveno decidis, ke en Mainz, okaze de la 43a U.K., okazos publika kunveno de juristoj, al kiu estos invititaj ĉiuj membroj de IAJE kaj germanaj juristoj neesperantistaj. La ĉeftemo de la kunveno estos unu grava punkto el la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. La ĉefraportanto estos Prof. Lapenna kaj la kunraportantoj apartenu al diversaj landoj kaj juraj sistemoj.
7. La kunveno opinias, ke en la nuna stadio ne estas oportune formi naciajn asociojn de juristoj-esperantistoj aŭ naciajn sekciojn de IAJE.

Ok invititoj el 5 landoj ĉeestis la fondkunvenon de la **Internacia Verkista Asocio**. La celoj de I.V.A., laŭ la provizore akceptita regularo, estas:

a) doni firman bazon por solidareco kaj komuna laborado inter ĉiuj verkistoj de la internacia lingvo Esperanto;

b) reprezenti la verkistojn en ĉiuj rilatoj kun la Esperanto-movado, kiuj koncernas ilin kiel verkistojn; gardi la interesojn de siaj membroj rilate aŭtorajn rajtojn, honorariojn kaj tradukojn, ankaŭ rilate neesperantistajn eldonejojn;

c) starigi kaj firmigi la bonan reputacion de la Esperanta literaturo en ĉiuj rondoj neesperantistaj.

Oni proponos al la membraro tripersonan komitaton: Prezidanto, William Auld; Vicprezidanto, Ivo Rotkvic; Sekr.-Kasisto, proponota.

La provizora Prezidanto, s-ro Auld, raportis, ke ĝisdate 35 esperantistaj verkistoj akceptis inviton aliĝi al I.V.A. Estas notinde, ke laŭ la Regularo, aliĝo al la Asocio okazas nur per invito kaj voĉdono inter la membroj, kaj ne per sinpropono. La 35 ĝisnunaj membroj apartenas al 17 diversaj landoj.

Okazis en la kadro de la kongreso ankaŭ jenaj aliaj fakkunsidoj:

La jarkunveno de **Internacia Scienca Asocio Esperantista** traktis ĉefe la problemon de la reorganizo de ISAE. Nome, la nuna stato en la Esperanto-movado postulas fortan fakan aktivecon, ne tiom inter la esperantistaro kiom en la fakaj internaciaj organizaĵoj. Pro tio Esperantistoj devas grupiĝi laŭfakte tiel ke la esperantistaj samfakuloj estu forte kunligitaj. Aliflanke, tro malgrandaj laŭfakaj E-asocioj estus malfortaj. Pro tio la estraro de ISAE decidis alvoki ĉiujn sciencistajn E-asociojn unuiĝi en forta scienca asocio, en

kiu diversaj sciencaj branĉoj aktivus memstare kiam koncernus la fakan aktivecon, kaj kune kiam temas pri la ĝenerala scienca aktiveco. La jarkunveno de la ĝisnunaj ISAE akceptis la proponon, ankaŭ la kuracistoj el TEKA kaj la juristoj, kaj verŝajne tion faros ankaŭ la geografoj.

Krom tio la jarkunveno decidis restarigi la Centron por la traduka servo pere de Esperanto, kiu montros la utilecon de Esperanto ankaŭ al la fakuloj neesperantistaj.

La dua, publika, kunveno de ISAE estis dediĉita al internaciaj kulturaj interŝanĝoj. La kunveno decidis starigi la „Centron por internaciaj kulturaj interŝanĝoj” (CIKI), kies unua tasko estas ebligi sendadon de sciencaj kaj aliaj esperantaĵoj al esperantistoj en la landoj kun nelibera monŝanĝo, poste eble ankaŭ fari la personajn interŝanĝojn por sciencaj prelegoj, studado, k.v.

Dum la kongreso funkciis la budo de ISAE, en kiu oni akceptadis novajn aliĝojn al ISAE kaj antaŭmendojn por la unika, baldaŭ aperonta volumo de originalaj sciencaj esploroj „Sciencaj studoj”. En la sama budo oni povis fari donacojn kaj pruntedonojn al la fondaĵo „Scienco”, kiu estos la baza kapitalo por publikigo de sciencaĵoj en Esperanto.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj havis tri kunsidojn dum la kongreso. La Komitata kunsida, ĉe kiu estis reprezentitaj 4 el la 9 membro-asocioj de ILEI, unuanime decidis daŭrigi ĝis plua evoluo de la cirkonstancoj la eldonadon de la „Instruista Letero”, sed sendi komunikojn de la Centra Oficejo de ILEI al „Internacia Pedagogia Revuo”. La unua publika kunsido, kiun ĉeestis 62 personoj el 15 landoj, diskutis la temon: „La laboro de nacia instruista Esperanto-asocio; taskoj farendaj, farindaj kaj fareblaj”. La dua publika kunsido, kiun ĉeestis 69 personoj el 10 landoj, diskutis „Limojn de la profesiaj devoj de instruisto”.

Sub prezido de D-ro Herrmann (Germanujo), **Eŭropa Lingva Kampanjo** havis kunsidon de 40 partoprenantoj el 12 landoj. Oni decidis daŭrigi la kampanjon por la enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo en Eŭropo, ekzemple per eksperimenta instruado en pluraj landoj eŭropaj: por ekscii, ĉu la ĝenerala opinio en la publiko estas favora, speciala komitato de eŭropaj urbestroj kaj magistratoj, sub prezido de S-ro Ĉefurbestro Stein de Mainz, faros enketon.

Kristana Esperantista Ligo Internacia, sub prezido de s-ro D. de Boer, diskutis la temon: Kiel ni kristanoj prezentu nian opinion pri la mondaj cirkonstancoj rilate al la militaj minacoj kaj militaj preparoj.

S-ro R. Sakowicz (Pollando) prezidis kunvenon de **Veterana Esperantista Klubo**. 17 partoprenantoj el 6 landoj diskutis pri „Spertoj el fruaroj”. 500 veteranoj, kiuj esperantistiĝis antaŭ pli ol 40

jaroj, estas nun registritaj. En Marseille s-ro Honoré Bourdelon, Prezidanto de LKK, estis ricevita en la Klubon.

La interna organizo de la asocio estis la temo de la kunveno de **Tutmonda Kuracista Esperantista Asocio**, kiun Prof. G. Canuto prezidis.

La **Internacio de Militrezistantoj** kunsidis sub prezido de f-ino Noll. 60 partoprenantoj el 11 landoj diskutis pri „Ĉu Esperantismo aŭ la atom-bomboj?” En sia enkonduko al la diskutoj, s-ro Parker menciis la paradokson, ke neniuj deziras militon, sed la homoj ĉie ŝajnas subteni siajn registarojn en la esplorado kaj fabrikado de pli kaj pli potencaj iloj por la detruo de la homamasoj. Skizante la historion de la Ligo de Nacioj, li diris, ke paco ne povas esti fondita **nur** sur bazo de politikaj kaj ekonomiaj interkonsentoj; necesas krei internacian kunlaboradon sur la kampo de edukado, scienco kaj kulturo.

Lojalaj membroj de la Esperanto-movado havas la devon ĉiel subteni ĝian kunlaboradon kun UNESKO.

La ŝakludantoj estis aktivaj en Marseille, kaj **Esperanta Ŝakligo Internacia** havis kunvenon, kiun prezidis J. Duthilleul (Francujo). La eldonon de revuoj kaj libroj fakaj, kaj de fakterminaro, en Esperanto, estis diskutita. Okazis turniro inter 10 kongresanoj kaj 10 marsejlaj ŝakludantoj.

La Akademio de Esperanto

La Akademio havis privatan kunvenon dimanĉon posttagmeze. La publika kunveno de la ĉe-estantaj membroj de la Akademio: s-roj Isbrucker, Lapenna, Rotkvic, Stöp-Bowitz, Waringhien, estis dediĉita al esprimo de opinioj kaj de la Akademianoj kaj de aliaj esperantistoj pri la uzado de neologismoj. La rezulto de tiuj opini-esprimoj estis, ke rekomendinda estas meza vojo, kiu kondukus nek al rigida konservativismo nek al senbrida vortnovigado.

Aliaj Okazintaĵoj

AKCEPTO DE LA KONGRESANARO EN PARKO BORELY

En la Kastelo kaj Parko Borely, agrabla loko tre konata kaj ŝatata de la Marsejlandoj, la Urbo kaj la Komerca Ĉambro de Marseille akceptis oficiale la Kongresanaron. S-ro F. Ripert, skabeno, akceptis la gastojn en la nomo de la Urbestro. Ĉeestis multaj lokaj eminentuloj, inkluzive la Re-prezentantojn de la Prefekto kaj de la Komerca Ĉambro, kaj multajn naciajn konsulojn. S-ro skabeno Ripert esprimis denove ĝojon, ke lia urbo estas la rendevuejo de tiel grava internacia kunvenantaro. Prof. G. Canuto dankis je la nomo de la kongresanaro, kaj diris, ke la gastoj favore sentis, ne nur la belecon de Marseille, sed ankaŭ

la ĝentilecon de la loĝantaro. S-ro Arnaud, je la nomo de la Komerca Ĉambro, salutis „tiujn homojn kiuj oferas sian vivon al idealo: alporti pacon al la mondo dank’ al lingva komuneco. Tiujn Marseille, pacama civito, bonvenigas kun vera ĝojo”.

Post la paroladoj, s-ro Ripert donacis „al la tuta kongresanaro”, pere de Prof. Canuto, memor-medalon de la urbo.



LA GAZETARA SERVO

Bonege funkciis la Gazetara Servo, antaŭ kaj dum la Kongreso. La rezultojn de tiu funkciado oni povis konstati per la amasaj favoraj raportoj en la nacia gazetararo en Francujo kaj ankaŭ en Italujo. Neniam antaŭe la rikolto de eltranĉaĵoj estis tiel multnombra kaj tiel objektiva; neniam antaŭe okazis, ke tiom da ĵurnalistoj proprainiciate (eĉ el

Italujo) venis al Kongreso por tie profunde esplori, kun serioza objektivo, la pretendojn de nia lingvo. En la gazetaro tute mankis la mokaj nuancoj kaj supraĵaj spritaĵoj, al kiuj ni bedaŭrinde tro kutimiĝis. Al tiu ĉi gravega sukceso unuarange kontribuis la kongresa Gazetara Servo en kiu laboris s-roj Beau, Cousineau kaj Saretto kaj iliaj helpantoj.



Nova iniciato de la ĉijara Gazetara Servo estis serio de 7 diversfakaj artikoloj, verkitaj de spertaj fakuloj por disvastigo en fakaj gazetoj; tiuj artikoloj estis je dispono de kongresanoj kun kontaktoj kun seriozaj nacilingvaj periodaĵoj, por traduko, eventuala modifo, kaj publikigo. Estas antaŭvidite, ke tiun novan, gravan servon, oni en la venontaj jaroj multe plilarĝigos.

La bultenoj de la Gazetara Servo aperis en

Esperanto kaj franca lingvo ĉiutage dum la Kongreso.

LA KONGRESO FILMITA

Ĉeestis la kongreson laborkomunumo de germanaj fervojistoj-esperantistoj — inter ili, la prezidanto de la germanaj esperantistaj fervojistoj, s-ro Giessnev el Braunschweig — kiuj kreas esperantlingvan sonfilmon en larĝeco de 16 mm, kaj por la filmo ili kaptis multajn okazintaĵojn dum la kongreso, inkluzive la inaŭguron, la I.S.U., la Kongresan Balon, la Infankongreseton, la Oficialan Akcepton kaj la ekskursojn. La epizodoj estis kunligitaj de kelkaj ĉarmaj roloj, luditaj de laikaj geaktoroj esperantistaj.

La celo de la filmo estos, unue, havigi al la tutmonda esperantistaro fortan helpilon por starigi grupvesperojn, kaj due, altiri simpatiantojn kaj adeptojn al la movado, ĉar tia filmo, kiu montros gravajn kaj seriozajn, kiel ankaŭ viglajn kaj gajajn scenojn el la esperantista vivo, pli celtrafe efikos ol longaj prelegoj aŭ flugfolioj. La dekmiloj da esperantistoj, kiuj ĝis nun ne havis okazon viziti kongreson, per la filmo povos ekkoni ĝin, kaj eble estos stimolitaj partopreni venontajn kongresojn.

RADIO

Raportistoj de Radio Zagreb ĉeestis la tutan kongreson, kaj registris la ĉefajn okazintaĵojn sur sonbendoj, kiujn ili utiligis por raporti la kongreson ankaŭ en la esperantlingvaj dissendoj dum aŭgusto.

LA DUA INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Partoprenis 16 infanoj el 4 landoj. Kvankam la nombro estis pli malgranda ol en la pasinta jaro, tamen la kongreseto estis fakte eĉ pli sukcesa, ĉar ĉiuj ĉeestantaj infanoj vere bonege parolis Esperanton, kaj eĉ rifuzis paroli nacilingve al vizitantoj. La celo de la Infanaj Kongresetoj estas krei kondiĉojn por internaciaj rilatoj kaj interkompreniĝo, kaj la infanoj senĝene plenumis tiun celon. Videble ili ĝuis la bonajn aranĝojn: ili ludis, ekskursis, rigardis filmojn, kaj evidente estis tre kontentaj pri la tuta aranĝo.

Espereble en Mainz okazos la 3a Internacia Infana Kongreseto; ni firme rekomendas ĝin al la gepatroj de niaj esperanto-parolantaj infanoj.

DISERVOJ

Dimanĉon, la 4an de aŭgusto, je la 17a horo, okazis la Kongresaj Diservoj. La katolikoj diservis en la preĝejo „Notre-Dame de la Garde”, la protestantoj en la Templo, rue Grignan.

Okazis ankaŭ kunveno de framasonoj esperantistaj.

27a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

Kvankam la 27a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis pro diversaj kaŭzoj en Lyon (Francujo) de la 30a de julio ĝis la 2a de aŭgusto, ĝi tamen estis aranĝita en la kadro de la 42a U.K. Ĝin partoprenis blindaj esperantistoj kun siaj gvidantoj el multaj landoj, sume 80 personoj. Oficiale reprezentitaj per delegitoj estis jenaj landoj: Alĝerio, Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francujo, Germanujo, Grekujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Nederlando, Norvegujo, Sudafriko, Svedujo.

La honoran Prezidantecon afable akceptis S-ro Prof. Allix, Rektoro de la Liona Universitato. Kiel prezidanton, la kongresanoj elektis samideanon Rajmondo Gonin (Franca). Kiel vic-prezidanto funkciis samideano doktoro Bano, Hungara.

Dum la malferma kunsido estis reprezentitaj diversaj organizaĵoj esperantistaj kaj problindulaj, kies sekcioj laboras en Liono. Referatoj, prezentitaj en la laborkunsidoj, pritraktis la jenajn temojn: „La blindulafero en Ĉeĥoslovakio kaj Sovetunio”. „Cerbo de blinduloj kaj okulo de vidantoj en frata kunlaboro”. „Edukado de blinduloj”. „La almozpetado kaj ĝia signifo por blinduloj”. „La blinduloj en Greklando.” Post ĉiu raporto okazis vigla diskutado. La kongresanoj precipe interesiĝis pri la vivo de blinduloj en la Orientaj landoj.

La Ĉeĥoslovaka samideano Krchnak, kiu parolis pri tiu temo, kompleze kaj elĉerpe respondis ĉiujn demandojn. Ankaŭ hungara delegito koncize raportis pri la nuna farto de sialandaj samsortanoj. Tre aparte menciinda estas oficiala akcepto de la kongreso en la Urbodomo.

AMUZAĴOJ

Inter la seriozaj laboroj de la kongreso la esperantistoj kompreneble bone amuziĝis. Elstare oportuna aranĝo de tiu ĉi kongreso estis la kongresejo, kie oni povis sidi komforte en plena aero kun siaj amikoj kaj ricevi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Esperable simila aranĝo okazos ankaŭ en venontaj kongresoj, ĉar tia afero multe kontribuas al la amikeca komuna vivado. Unu vesperon oni eĉ improvizis dancadon en la korto de la kongresejo, kiu daŭris ĝis la noktomezo, kaj la multaj partoprenantoj aparte ĝuis tiun improvizaĵon.

La Interkona Vespero okazis en la Operejo de Marseille — loko ne tute oportuna por tia vespero, ĉar oni ne povis libere ĉirkaŭiri por renkonti siajn amikojn, pro la seĝovicoj kiuj kompreneble staris en la halo. Malgraŭ tio, la kongresanoj vigle interkonatiĝis kaj salutis amikojn novajn kaj malnovajn. La Kongresa Balo okazis en hotelo „La Plage”, sub la nokta ĉielo, ĉar interne oni ne povas aranĝi balon en varmega somermeza Marseille. Oni povas diri, ke la balo estis brila sukceso. Vizitado tra la urbo kaj la haveno, kaj al la fam-

konata Château d'If, estis plurfoje aranĝita dum la semajno, kaj amase partoprenita.

Ĵaŭdo estis la tago de la ekskursoj, kaj la kongreso formigris, iuj al folkloro Provenco, aliaj al blua mediteraneo, aliaj al la montaj interkrutaĵoj. Tiuj, kiuj tamen ne forlasis la urbon frumatene, povis posttagmeze viziti la fabrikejon „Nestlé” kaj tie interalie gustumi la faman ĉokoladon tie preparitan.

Vendrede okazis prezentado de filmoj en Esperanto.

La Solena Fermo

Malgraŭ la varmego, la Zamenhof-salono estis plenplena sabaton matene, kiam Vic-prezidanto H. W. Holmes, O.B.E. malfermis la lastan kunsidon de la kongresa semajno.

Unue la Ĝenerala Sekretario de UEA, Prof. D-ro Ivo Lapenna, raportis pri la decidoj de la Komitato, kiu en komisionoj kaj plenkunsidoj laboris dum la semajno proksimume 30 horojn. Li raportis ankaŭ pri la kunsidoj de la Estraro. Pri la decidoj de la Komitato oni povas legi sur alia paĝo; la Estraro diskutis interalie jenajn temojn: la financoj de la Asocio; la situacio en la diversaj oficejoj de UEA; la Lingva Komisiono de UEA, kiu donos plej altajn atestilojn de kompetenteco al Esperanto-instruistoj kaj aprobos lernolibrojn. Tiu lasta projekto estis ankoraŭ nematura, kaj la Estraro starigis Komisionon por pretigi la detalojn. La Estraro elektis novan Sekretarion de I.S.U. Pro la eksiĝo de s-ro Rossetti, oni petis f-inon Marjorie Boulton transpreni tiun taskon. D-ro Szilagyi, Sekretario dum pluraj jaroj de la Belarta Konkurso, esprimis deziron pro malsano eksiĝi el tiu funkcio, kaj la Estraro invitis novan Sekretarion, kies akcepto ankoraŭ ne estas ricevita. La Estraro pritraktis la Anglan Antologion, kiu aperos antaŭ la fino de la nuna jaro en la Eldona Fakto de UEA. La klopodoj akiri juran personecon por UEA bone progresas, kaj oni esperas baldaŭ ĝin ricevi. Pri eksteraj rilatoj kun U.N., Eŭropa Konsilantaro, k.a., la Estraro konstatis, ke ni sukcesis rompi multajn el la ĉeloj, en kiuj ni estis fermintaj nin.

Post la raporto de D-ro Lapenna, oni prezentis premiojn al la ĉeestantaj gajnintoj en la Belarta Konkurso.

D-ro Herrmann, Estrarano de UEA, poste invitis la kongresanojn al la 43a Universala Kongreso, kiu okazos venontjare en Mainz, Germanujo. D-ro Herrmann bedaŭris, ke nia samideano la Ĉefurbestro de Mainz, s-ro Stein, ne povis mem inviti la kongresanojn al sia urbo, sed s-ro Stein devis pli frue forlasi Marsejon pro la konsiloj de sia kuracisto. En 1951 la U.K. okazis en Munkeno. En 1958 ĝi denove okazos en Germanujo, ĉar ĝuste la fakto, ke la Ĉefurbestro de Mainz havas specialan intereson pri la afero, donas aparte favo-

ran cirkonstancon. S-ro Stein jam promesis la plej fortan apogon al la 43a. Ekster sia granda persona influo, li disponigos al KKS kaj LKK, je kosto de la urbo, specialan oficiston ekde januaro 1958. Mainz estas malnova urbo, bone konata inter la gajemuloj; ĝia karnavalo estas mondfama. Ĝi havas nur 150,000 enloĝantojn, do la loĝantaro ne superinundos la Kongreson. Oni atendas speciale multnombran aliĝon al la 43a en Mainz, la urbo de Guthenberg kaj de la presarto.

Post la invito de D-ro Herrmann, sekvis la danko al la LKK en Marseille, kiu vere bonege laboris por sukcesigi la nunjaran Kongreson. Unu post alia la membroj estis prezentitaj de s-ro Holmes, kaj ĉiu ricevis merititan aplaŭdegon, kiu esprimis la kontentecon de la kongresanoj. En speciale ĉarma ceremonio, la virinaj membroj de LKK ricevis belajn florbukedojn.

S-ro G. C. Fighiera, KKS, stariĝis por doni resumeton pri la laboroj de la pasinta jaro. Li diris, ke en Marseille ni havis, por la unua fojo, du Konstantajn Kongresajn Sekretariojn; dum 15 monatoj, dum ĉiuj horoj de ĉiuj tagoj, s-ro Honoré Bourdelon, Prezidanto de LKK, laboris por la Kongreso. S-ro Bourdelon, kiu nunjare festas 25 jarojn kiel Prezidanto de la loka Esperanto-societo, akompanis la KKS de oficejo al oficejo en Marseille, donante la helpon kaj apogon de sia prestiĝo en la urbo. „S-ro Bourdelon” diris la KKS, „apartenas al Marseille, kiel la katedralo de Notre Dame de la Garde”. En la nomo de LKK, s-ro Fighiera transdonis al s-ro Bourdelon, kiel ateston pri profunda dankemo, speciale ledbinditan, orumitan ekzempleron de la Kongresa Libro — vere perfektan ekzemplon pri la bindista arto. La aplaŭdoj estis tondraj, ĉar dum la kongresa semajno la granda persona ĉarmo de s-ro Bourdelon sentiĝis al ĉiu kongresano.

Post tiu emocia momento, tuj sekvis alia. Prof. D-ro Giorgio Canuto, Prezidanto de UEA, stariĝis por saluti s-ron Ludoviko Zamenhof, nepo de la iniciatinto de la Internacia Lingvo. Prof. Canuto substreki la gravecon de ties ĉeesto. Kvankam Esperanto estas „nenies propraĵo”, ni neniam forgesu, ke nia lingvo estas fakte kreaĵo de ies genio. La solvon de la lingva problemo ni ŝuldas al L. L. Zamenhof. La ĉeesto en Marseille de lia nepo signifas ankaŭ, ke la malfacilaĵoj, kiuj malhelpis lian ĉeeston en aliaj kongresoj, komencas malaperi.

Kiam la entuziasmaj aplaŭdoj denove silentiĝis, s-ro Zamenhof dankis pro la varmaj vortoj, kiuj, li diris, ne estis merititaj de li mem. Li sentis profundan feliĉon, ke post pluraj jaroj, dum kiuj li ne povis ĉeesti, li denove ĝuas la unikan atmosferon de amikeco kaj kompreno. Li esprimis la esperon, ke denove en postaj kongresoj li povos partopreni kaj kunlabori.

Nun vere alproksimiĝis la lastaj momentoj de la 42a U.K. Post mallonga dankesprimado al ĉiuj, kiuj laboris por ĝia sukceso, kaj speciale al la

aktoro, kiu bone studis por doni al ni plezuron, la Prezidanto de UEA diris: „Kutime dum somero la homoj kuracas siajn malsanojn, ĉe la marbordo aŭ en la montaro; ni, stranga popolo, uzas nian ferion por iri al Kongreso, kie ni ne kuracas sed plifortigas nian malsanon, ĉar ni hejmeniras pli esperantistaj ol antaŭe.” Prof. Canuto esprimis la esperon, ke ĉiu kongresano diros al si: tiun ĉi jaron mi volas vere labori por UEA, trovi ne dekojn sed centojn da novaj samideanoj. Li atentigis, ke la nuna momento estas speciale favora por nia ideo; ni kaptu tiun momenton. UEA bezonas multajn delegitojn — en ĉiu urbo kaj urbeto estu delegitoj de UEA, ne nur en la plej grandaj. La Fakaj Delegitoj povas esti granda helpo, ĉar ili apogas la transiron sur la kampon de teĥnika helpo, kie la Internacia Lingvo estas urĝe bezonata.

Post tiuj vortoj, la Prezidanto transdonis la grandan flagon, simbolon de la kontinueco de niaj kongresoj, de Marseille al Mainz, kaj per kantado de la himno la 42a Universala Kongreso de Esperanto oficiale fermiĝis.



„Ĉe la esperantistaj kongresoj montriĝis, ke la esperantistoj ne sukcesis interkompreniĝi pere de sia lingvo”. — (skolo de Blinkenberg, ĉ. 1950).

ĈIU AKTIVA ESPERANTISTO

deziras konservi kaj konsulti siajn jarkolektojn de la revuo „Esperanto”. Aparte taŭga estas la bela verdtola bindaĵo speciale farita por via

JARKOLEKTO 1956

Havebla de UEA.


Prezo: 2.50 gld. (10 steloj)

Honoré Daumier

1808 - 1879



La servema defendanto



En la pulbalkono



La 3a-klasa kompartemento

En Marsejlo, la urbo de nia 42a U.K., naskiĝis la granda franca pentristo kaj kreinto de la politika karikaturisto Honoré Daumier.

En lia verkaro ni trovas kompletan bildon pri la luktoj kaj esperoj, la perfidoj kaj tragedioj en Francujo dum la deknaŭa jarcento, kiam Monarkio sekvis Respublikon kaj Respubliko Monarkion. Daumier ne estis nura rigardanto al la politika scenejo; li estis aktive kaj pasie demokrata. Laŭnature idealisma, li devis travivi epokon malnoblan kaj monakireman, kiam ĉie evidentiĝis mensogoj kaj stulteco, trompo, vanteco kaj hipokriteco, kaj „riĉiĝi rapide” ŝajnis la sola universala leĝo. Daumier observis la malvirtemon de la doktoroj, advokatoj, ministroj kaj ŝtatoficistoj. Kune tiuj homoj similis avidan ventron, kiu sin nutris per la malriĉuloj; unuope, ĉiu individuo ŝajnis personigo de senutilo, avareco kaj korupteco.

Dum la vivo de Daumier, malmultaj homoj, krom liaj intimaj amikoj, alte taksis lian kvaliton kiel pentristo. Eĉ hodiaŭ, kiam ĉiu kritikisto laŭdas lin kiel desegniston kaj litografiston, ne ĉiu taksas plej alte liajn pentraĵojn. Kiel mirinda karikaturisto kaj fervora defendanto de la libero li havas tutmondan reputacion, sed kelkfoje lia humoro estis iom pli milda; tiam li rezignis pri sia senkompata mokado de korupta socio,


kaj montris sin senkompara registranto de tiamaj moroj. Sed eĉ en tiu okazo oni admiras ĉefe la komentariiston, kaj lia politika sinteno kaj morala celo estas pli alte ŝatataj ol lia arto.

Sendube li estis genia litografisto. Tiu tehniko estis novaĵo en lia tempo, sed verŝajne li tuj ekkomprenis instinkte ĝiajn eblojn, ĉar tuj li levis ĝin al plej granda perfekteco. Supozeble lia litografika genio ankoraŭ hodiaŭ blindigas kelkajn kritikistojn al la graveco de liaj pentraĵoj; laŭ ili, lia lukto por perlabori sian panon malebligis lian maturiĝon kiel pentristo. Tiaj kritikistoj diras, ke la desegnaĵoj de Daumier reprezentas lian panlaboron, kaj ke liaj pentraĵoj estas flankajo.

Tamen aliaj opinias, ke Daumier estis antaŭ ĉio pentristo, kaj ke li estis unu el la grandaj pentristoj de tiu jarcento. La desegnaĵoj de Daumier vigligas la fantazion ĉar ili enhavas riĉajn detalojn, kiuj ilustras multajn facetojn de la homa vivo. Sed liaj pentraĵoj estas tute aliaj; en ili li monumente, en la tradicio de Miĥel-anĝelo, koncentrigis la intereson kaj subpremism la detalojn.

Multajn el siaj verkoj Daumier dediĉis al la juĝeja komedio. La legantoj vidas unu el ili: „La akuzito havas la parolon”.

Daumier mortis en malriĉo, sed li lasis al ni riĉan trezoron: sian koron kaj sian arton.



La akuzito havas la parolon

Niaj Konkursoj

LITERATURA KONKURSO N-ro 3

raporto de John Varty

Temis verki ĵurnalraporton, kiu enhavu titolojn de Esperantaj libroj kiel normalajn vortojn en la frazoj. Ĉifoje la nivelo de la konkursaĵoj estis alta. Mi ĝojis vidi, ke oni ne kontentiĝis per titoloj el aktualaj librokatalogoj, sed montris riĉan scion ankaŭ pri pasintaj verkoj. La librotitoloj inspiris raportojn sensaciajn kaj groteskajn, sed ĝenerale la titoloj sidis sentrude en la rakonto-fluo. **Nekonatino** raportis pri internacia boatkonkurso kun interesa fino:

Sed la kulminacio estas la tradicia **kiso de la reĝino** al la unua venkinto, kaj — **pli ol fantazio** — la reĝino faras sian paroladon en **nia lingvo Esperanto**. Estas la unua fojo, ke iu kronulo oficiale uzas ĝin, „la lingvo de la mondo”, kaj estas vere la **tragedio de l' homo**, ke tio ne okazis dum la vivo de **Zamenhof**: nun li nur povus esprimi sian kontentecon per **letero el la transcendo**.

Bedaŭrinde ŝi pekis, citante kvin titolojn de Esperantaj gazetoj simple kiel raportantoj de la konkuro, kaj kelkajn librojn kiel premiojn por la venkintoj (tiuj titoloj estas do neasimilitaj). **Lipharulo** tre sprite raportis pri fakte okazintaj fantom-petoloj en vilaĝo (la nacilingvan ĵurnalraporton li kunsendis). Pluraj atingis altan densecon de titoloj: **ToRo** en kadro de 235 vortoj enportis 47 titolojn: **B. C. Sliggers** per 267 vortoj — 53 titolojn, kaj **Pierre Boulogne** (61 titoloj en nur 241 vortoj!). Eĉ pli grandan virtuozecon atingis **Horst Michling** per 67 titoloj en 255 vortoj (mi indulgas la bagatelajn transpaŝojn de la 250-vorta maksimumo). Ĉiuj raportoj legiĝas mirinde glate. Kompreneble nura denseco de titoloj ne estas sola kriterio.

Rudolf Grosser liveris amuzan dialogon inter junulo vaganta en parko kaj bela fraŭlino. Jen ties fino:

- Ŝi. Kio trembrilas en via mano?
Li. Donaco por via fingreto: **LA RINGO DE LA GENERALO**.
Ŝi. **AMO, FONTO DE LA VIVO!** — Por ĉiam la via!
Li. Ĉu vi jam pripensis iomete pri **LA INFANA RASO**?
Ŝi. Ho ve, mi hontas!
Li. Nu, baldaŭ sidos **TRI HOMOJ EN BOATO**.
Ŝi. Jes, la **VAGABONDO KAJ SINJORINO**... kun bebeto.
Li. Tial... **SENHALTE AL LA CELO!**
Ŝi. Kun vi ĝis la **POLUSAJ GLACIOJ SUB NOKTMEZA SUNO!**
(**Ambaŭ foriras brakon en brako**)

LA FINO

Kaj **Vana Kanto**, kun samaj ĉefpersonoj, tre lerte donas sian raporton per rimitaj versoj. Jen la sprita komenco (bedaŭrinde li iom zigzagis poste):

VAGABONDO KAJ SINJORINO

vojaĝas per **TEMPOMAŜINO** kun **KNABOJ DE PAŬLOSTRATO** kaj **TRI HOMOJ EN BOATO** per **SALTEGO TRANS JARMILOJ** ke miras eĉ aviadiloj.

Parolas la vagabondo post vojaĝo **TRA LA MONDO**: nur **KREDU MIN, SINJORINO**, kaj **ANSTATAŬA EDZINO**, **EN JARO DEKMIL LA AMO** nur estos nova dramo pri **EVA KAJ ADAMO**.

Nu, tiuj ne havas la formon de tradicia ĵurnalraporto: ni tamen ne staru tro pedante antaŭ la kreema spirito!

Ankaŭ **ToRo** vojaĝas per la Tempomaŝino, kaj kiam li revenas:

La vojo returne kondukis al infanoj de l' atombombo, homoj en milito sur sanga tero. Mi ne cerbumas pri la arto fariĝi centjara. La mondo ne havas atendejon. Koko krias jam. Vivo vokas. Mi volas iri kantante antaŭen ĝis la fino.

Mi trovis la juĝadon neordinare malfacila. Mi ne volis preferi kategorio inter la du ĉefaj specoj liveritaj: la farsa gulaŝo, kie la titoloj diktas la rakonton, kaj la pli originala temo, kiu elektas titolojn konforme al sia celo. Cetere la limo neniel estas neta. Fine mi rezignis arbitri inter la procesraporto de **B. C. Sliggers**, la kurioza okazaĵo en vagono de **Pierre Boulogne**, „Pli ol fantazio” de **Horst Michling** kaj „La granda aventuro” de **ToRo**. Mi rekomendas por ĉiu premion (libron) en valoro de 5 guldenoj, kaj regalias per merita mencio la provojn de **Rudolf Grosser**, **Lipharulo** kaj **Vana Kanto**. Bedaŭrinde nia spaco permesas presi nur unu el la premiitaj verkoj.

ROZOJ KAJ "URTIKOJ" EL STRANGA BUTIKO.

Juĝisto **D-ro Knock** finis esploron kontraŭ „la virineto en bluo”, fraŭlino **Suzano H.** (florbutikistino, **Turstrato 4**), kiu per **diverskolora bukedeto** venenis la fratojn **Karlo** kaj **Petro P.** La **viktimoj** malsaniĝis post kiam ili ekflaris odoron de **floretoj** venditaj de **S.H.** En la malsanulejo **D-ro Dorner** konstatis, ke veneno el **oriento** kaŭzis la malsanon. Hieraŭ la **botistoj P.** hejmeniris sanaj.

La akuzitino (la **komencanto** multpromesanta en la **arto de memdisciplino**) rakontis **kontralte**:

„Ambaŭ fratoj estis farintaj edziĝope-tojn, sed mi ne povis elekti el la **amkonkurantoj**. Dum ferio en la **montoj** mi rakontis tion al sinjorino, dirante: „**Kredu min, sinjorino**, estas malfacile decidi.” Ŝi donis parfumon, kies aromon la fratoj devis enspiri, kaj asertis: „Tiam okazas **nenio** danĝera; la junulo, kiu malsaniĝos, pleje amas vin.” Mi verŝis la fluidaĵon sur rozetojn, kiujn **Karlo** kaj **Petro** mendis al mia **fratineto Marta**. Malsaniĝis

ambaŭ, sed **Karlo** pli grave. Lin mi edziniĝos.”

„**Hura!**” ekkriis **Karlo** post tiu **deklaracio**. „Ĉu vi aŭdis tion?” (Oni ridas.)

La prokuroro ne sciis kia puno konvenus je la fino de tia **stranga idilio**: „**ekzilo**, monpuno de **5.000.000** spesoj aŭ sep **vangofrapoj**. Klasika afero: **juneco kaj amo**. La **mistera sinjorino** estas **suspektinda persono**, sed ne **malbona sinjorino**, alie la afero nomiĝus „**ferio kun la morto**”. Li postulis monpuneton.

Advokato **T.** pledis kun retoriko: „**Bagatelaro! La alta kanto de la amo. Nobela peko!** Nesondeblaj **abismoj** de la **aminfero**. **Juna vivo vokas: nova sento** montriĝu. **Estu homo** kaj deklaru nekulpal!”

Post tiuj du paroladoj la **lerta juĝisto** kun **bonhumoro** parolis pri la **forto de l' vero**. La **salajro** nura por la **granda aventuro „krima”**: — edzecoligo.

B. C. SLIGGERS

Fine mi dankas la modelajn bibliografiojn, kiujn pluraj konkursintoj aldonis al siaj solvoj (unu estis eĉ alfabeto ordigita). — J. V.

GRAVA ALVOKO

En la sveda urbo **Karlskoga** la **esperanta societo** decidis fondi permanentan **esperantan altlernejon**. Por tiu celo ni bezonas multe da mono.

Antaŭ kelkaj jaroj ni pere de la **esperanta gazetaro** kaj **privataj esperantistoj** en ĉiuj landoj sukcesis enkolekti amason da infandeseĝoj. Per tiuj ni aranĝis ekspozicion kiu migris tra la tuta lando, estis priskribita en pli ol 250 enlandaj kaj multaj eksterlandaj gazetoj. Pere de vendado de tiuj deseĝoj ni nun havas fonduson je 10.000.— sv.kr. La kapitalo ankoraŭ ne sufiĉas. Tial ni nun turnas nin al la internacia esperantistaro, petante helpon.

Ni volas havi artaĵojn de la plej eble bonkvalitaj geartistoj. Tio estas: oleaj pentraĵoj, (plej preferindaj), akvareloj, pastelaj, deseĝoj, k.t.p., sed ne reproduktaj.

La intenco ne estas ke la esperantistaro donacos. Ni eĉ ne volas tion. Nia ideo estas ke ĉiu kiu povas (kaj ĉiu kiu volas, povas) priparolu la aferon kun ia artpentrist(in)o.

La afero estas priparolota en ĉiu sveda gazeto kaj verŝajne ankaŭ eksterlande. Tial oni facile povas konvinki la geartistojn pri la avantaĝo de la donaco, des pli se oni substrekos la bonan celon. Kompreneble estas bone se oni konas persone iun artiston, sed ĉu jes aŭ ne tio ne estas malhelpo.

En ĉiu okazo ni aŭtune 1958 komencos la altlernejon kun unumonata kurso sed en pruntita ejo.

La donotaj artaĵoj devas dorsflanke havi la titolon de la verko (esp. lingve) kaj la nomon kaj adreson de la artisto.

La sendaĵoj al:

Karlskoga Esperantosocieto
c/o E. Bonander
Kungsvägen 5, Karlskoga.
Svedujo.

Unika formo de muziko por gejunuloj

Kion oni aludas per tiu ĉi surskribo, tio estas muzika junularprizorgado!

Ni trovis en grandega klasejo en la paroĥa lernejo de la St. Vitus preĝejo en Bussum fraton Benitio. Pli ol 20 knaboj de 12 ĝis 15 jaroj (la 7a kaj 8a studjaroj)

estis tute konfeditaj al lia gardado; infanoj do, kiuj ne povas ricevi mezgradan aŭ gimnazian instruadon, kaj de kiuj oni intelektu ne multe povas postuli.

Frato Benitio instruas la ordinarajn lerneajn fakojn kaj aldonas al tiuj „verŝeton” da franca,

germana kaj angla lingvoj kaj iom da librotenado.

Sed, ĉar li amas la muzikon, (li estas lernanto i.a. de Elbert Franssen, kaj gvidas preĝejan ĥoron en Bussum) troviĝas ankaŭ piano en la klasejo, de kiu cetere grandega parto estas okupata per diversaj formoj de manlaboro. Veni tro malfrue ne ekzistas ĉe tiuj malfacilaj „duonkreskuloj”, kaj eĉ li havas penon igi ilin hejmeniri vespere. Kiam ili deziras finlabori ion, li kelkfoje bezonas mildan insiston por sendi ilin hejmen je la 7a kaj duono!

Kaj nun en ĉi tiu medio kun tiaj knaboj la muziko! Ilia aĝo malebligas, ke ili libere disponu ankoraŭ siajn sopranan aŭ aldan voĉojn, do la kantado estas preskaŭ nebla. Pro koincido de cirkonstancoj Frato Benetio ĉe sia amiko Huib Schreurs, la nuna direktoro de la malnova, famkonata orgenfirma Adema, aron da malnovaj orgentuboj savas de la neniiga morto, kriante: „Donu ilin al mi, por miaj knaboj!”

Li pensas: „Se mi donas al 12 knaboj po unu orgentubo, kaj ĉiu blovu ĝustatempe tonon de preskribita daŭro, mi disponas la kompletan kromatikan gamon, kaj mi ankaŭ povas formi per ili akordojn”.

Jen la principo kiun li praktikas kun siaj knaboj, kaj kiu jam prezentiĝis en radio kaj televideo. Vidante la knabojn muziki tiamaniere, mi pensis pri malnova bildo (de Johano Kellerthaler, Katzenklavier), sur kiu kelkaj katoj estas enfermitaj en klavikordo, dum la kapoj supre elrigardas. Viro tiras la voston, pro kio ĉiu besteto donas sian propran tonon aŭ krion!

Tiel en Bussum ĉe Frato Benitio ĉiu knabo ĝustamomente blovas sian orgentonon, kaj tiam oni ne aŭdas „Katzenjammer” kiel sur la sprita malnova karikaturo, sed orgenakordojn.

Frato Benitio skribas la notojn sur la nigran tabulon kaj ĉiu ludanto devas atenti akurate ĉu estas la vico de lia tubo. Bonega ekzerco por la muziklegado kaj la klerigo de la ritma sento! Kom-

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	10.17—10.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3°-Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00—19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30—22.55	Sofia, 39.11m, 30.93m, P.
Lundo	23.20-23.35	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
	17.30—17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m, 13.94 m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10—18.30	Valencia, 233m, P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 298m, 188m. P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, 11.70m. P. (D-ro Baur).
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	19.00-19.15	Stockholm, 33.60m., 26.50m., 19.90m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo. Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.50-23.00	Hilversum, 402m, I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso. Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat.)
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro. 375 m, 25.10 m, K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00—21.30	Rio de Janeiro, 214m. K. Radio Roquete Pinto PRDS, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 298m, 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 3-IX, Memoraĵoj pri Italujo de E. E. Yelland; 6-IX, La festo de Piedigrotta en Napolo; 10-IX, Septembro; 13-IX, Leterkesto kaj bibliografio; 17-IX, Novaĵoj el Italujo; 20-IX, Italujo kaj verkisto de Musset; 24-IX, Itala belarta urbo Agrigento; 27-IX, Aŭtuno. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

preneble por la kvin nigraj klavoj troviĝas nur unu tubo, kaj do la knaboj bone komprenas la enharmonan ŝanĝon. Kelkaj artistoj funkciigas du aŭ plurajn tubojn. En la komenco oni produktis kakofoniajn kombinaĵojn, sed nun oni reciproke atente aŭskultas, kaj oni perceptas erarojn unu de la alia, pruvo ke ankaŭ la aŭdsento pliboniĝas.

En la dua parto de la aŭdigo kiun mi ĉeestis, Benitio alvokis kelkajn bonajn kantistetojn, kaj oni samtempe kantis kaj blovis. La interesiĝo, kun kiu ĉio okazis,

estis kortuŝa. Unu el la muzikantoj, kiu funkciigis du tubojn, kuraĝe kunkantis kiam li havis paŭzon, por ĉiam ĝustatempe plenblovi la vangojn sur la tubobuŝaĵoj.

Estas ĉiam la sama fakto: ĉiu denaska pedagogo povas laŭ sia propra maniero instrui al la lernantoj kion li volas; en ĉi tiu kazo amon je la muziko, konon de la muzikskribo, ekzercadon de la aŭdsento kaj ritma sento.

Tiel mi antaŭe parolis pri „verŝeto” de tio ĉi kaj verŝeto de alia instrumaterio. Frato Benitio igas

ilin bone „libroteni” mem dum tuta jaro, sed per astronome grandaj nombroj da poentoj: centoj por eksterordinaraj faroj, sed same multaj deficitoj por faritaj eraroj. Je la jarfino ili venas kun ĉiuj tiuj akurataj librotenadoj, kies valoroj sumiĝas ĝis dekmiloj, je la tago de la premidisdon.

Ege kontentaj ni forlasis la „laborejon” de tiu bonega muzikpedagogo.

Art. de Theo van der Bijl en Organo de K.N.T.V. (Reĝa Nederlanda Muzikista Unuiĝo).

TRAD. BETSY LEOPOLD.

Daemoj de Simaraki-Taŝon

Apud la kastel' malnova de Komoro

Apud la kastel' malnova de Komoro blanka estas nub', mi vagas en langvoro. Verda stelari', ankoraŭ ne ekĝermis kaj la juna herb' por sido sin ne sternis. De l'arĝenta kovr' sur la monteta flanko fluas en degel' pro l' suno neĝa blanko.

Min ĉirkaŭas jam karese varma lumo, sed sur la kampar' ne plenas la parfumo. Frua la printemp' nebulas nemature, spikoj de horde' verdeton montras dure. Kaj nun vidas mi, ke vojaĝantoj foje iras kiel grup', rapidas kampovoje.

Sur Asama-mont' krepusko jam trankvilas, trista melodi' de ŝalm' de Sak min ŝiras. Ve, eniris mi gastejon apud bordo de Tikuma-flu' ondanta en akordo, kaj mi trinkis, nu, sakeon krudan sola, lacon de vojaĝ' lasante iom fora.



島
崎
村

Oriento, okcidento, sudo kaj nordo

Al kio mi komparu koron de la vir'? —
al herb' alblovanta la sovaĝa vent'?
Ĉar estas ĝi la vento, certe laŭ natur',
de l'orient' ĵus blovis, nun de l'okcident'.

Al kio mi komparu koron de l' virin'? —
al de la vent' blovata herbo, ve, sen fort'?
Ĉar estas ĝi la herbo, certe laŭ natur',
ĵus klinis sin al sudo, kaj nun al la nord'.

Stelo falanta

Eliris mi el pordo de l' domo splene,
atendante homon sentis malĝojon ene,
kaj mi rigardis al ĉiel' vespera.
Jen, ĝalis al tero steleto hela,
forlasis sian lokon en bela nuboj.
Ĉu ĝi sopiras mondon de homa rubo?

Blanka muro

Neniu vidis min al alta turo
ascendi, kie arbo ĵus ekfloris;
mi skribis pri l' sufer' sur blanka muro,
pri l'amĉagreno, kaj amare ploris.

Mi skribis tion tamen per salivo:
nek signo restis do, nek vortkonturo.
Sed am', sufero, larmoj de la vivo,
restados ĉiam ĉe la blanka muro.

Liriko ĉe vojaĝo al rivero Tikuma

Hieraŭ ankaŭ tiel jam estis same,
hodiaŭ ankaŭ tiel, ve, estos same.
Do kial mi prizorgas pri viv' gloriame?
kaj kial pri morgaŭo nur pensas vane?

Descendis mi al valo, en kiu glorioj
alternis kun disŝaloj, en rememoroj,
kaj vidis nun ke l'ondoj jen stagnas, kuras,
jen akvoj kun sableroj rekuras, hulas.

Ho, kion la malnova kastelo diras?
kaj kion eĥi borde la ond' deziras?
Nu, primeditu tempon pasintan fore:
Centjar' egalas tagon senmetafore.

Printempo de Tikuma ankoraŭ fruas,
nebulas la salikoj kaj akvoj fluas.
Ho, mi paŝante sola sur roka bordo
malĝojan penson ligas al rok' sen vorto.

El la japana trad. Miyamoto M.

Radio - Babiloj

(11)

La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas

Svisa Kurtonda Radio

La Esperanto-fako de la svisa radio ŝatas uzi la neologismon „kurta” anstataŭ „mallonga”. La neologismo havas la avantaĝon, ke ĝi estas... pli kurta kaj tuj komprenebla de okcident-eŭropaj popoloj kaj tiuj, kiuj parolas unu el ties lingvoj. Sed mi timas, ke alilingvaj popoloj ne tre ŝatas la duobligon de la nombro da adjektivoj en Esperanto rezulton-tan el la anstataŭigo de „mal-vortoj” per radik-vortoj. Ni estu singardaj kaj ne sen urĝo plimalfaciligu la relative facilan Esperanton.

Ni ofte aŭskultas la interesajn Esperanto-dissendojn de Radio-Bern, sed ĝuste ne tiun, en kiu d-ro Baur laŭdis nian laboron kaj ĉi tiun rubrikon. Samideanino samregiona, kiu aŭdis surprize klare tiun dissendon, informis nin telefone pri ĝi, sed... nur la postan tagon. Ni dankas d-ron Baur pro liaj afablaj paroloj kaj esperas, ke ĉi tiu rubriko multe pli-grandigos la Esperanto-radio-aŭskultantaron.

Aparte ni volas ankoraŭ atentigi niajn belegantojn pri detalo, kiu eble ne tuj kaptis ilian atenton. Temas pri la **vespera** dissendo, kiu ne plu okazas marde kaj ĵaŭde, sed lunde kaj vendrede kaj... kvin minutojn pli frue! La tempoj de la svisaj Esperanto-dissendoj ja nun estas: lunde 18.30 kaj marde 12.55 (d-ro Arthur Baur); ĵaŭde 12.55 kaj vendrede

18.30 (prof. d-ro Edmond Privat). Nepre aŭskultu kaj esprimu vian dankon!

Esperanto-radiodissendoj el Brazilo

Kvankam ni mem en Frislando, unu el la du plej nordaj provincoj de Nederlando (Eŭropo), ĝis nun ne sukcesis aŭdi brazilan stacion, ni volas por eble pli bonŝancaj geaŭskultantoj transdoni valorajn informojn, kiujn skribe havigis al ni la „Esperanto-Departemento” de la „Legio de la Bona Volo” (LBV), kiu jam ricevis plurajn korespondadojn el 23 diversaj landoj. Tia korespondado tre efikas precipe sur la estraron de LBV, ĉar ĝi ja pravas elokvente, ke nia kara interkomprenigilo estas la vera Internacia Lingvo de la tutmonda bona volo.

LBV sukcesis aĉeti kun helpo de ĉiuj LBV-anoj la radiostacion „Mundial” (= tutmonda; elparolu: mundial’), kiu tiel fariĝis sendostacio de LBV. La aĉetita stacio ankoraŭ ne havas mallongajn ondojn. Tial ĝi dissendas la „Kampanjon de la Bona Volo” kune kun du aliaj stacioj mallongondaj. Aŭskultu laŭ GMT:

DIMANĈE 10.17—10.30 Rio de Janeiro, 25,48 m (11775 kc),
30,78 m (9745 kc): K kaj I.

SABATE 18.30—19.00 Rio de Janeiro, 25,1 m (11950 kc),
375 m (800 kc): K. kaj I.

21.00—21.30 Rio de Janeiro, 214 m (1400 kc):
K.

Proksiman fojon ni donos pli da informoj. Sukceson!

S. S. de Jong

APO EN HINDUJO

Al la multaj problemoj ekzistantaj en Hindujo, mi klopodis aldoni unu pluan: tiun de la Internacia Lingvo. Kaj tio ne estas facila tasko en lando, kiu dum du jarcentoj estis sub brita regado, kaj kie la kono de la angla lingvo signifas ne nur klerecon, sed ankaŭ kontakton kun la cetera mondo. Tiel, ĉiu klera Hindu, krom sia nacia lingvo (tamil, tegul, urdu, bengali, marathi, gujerathi aŭ iu alia el la multaj hindaj lingvoj) devas paroli la novan nacian, la „hindi” kaj la anglan. En tiu situacio estas malfacile ŝanĝebla io ajn en la proksimaj jaroj.

Tamen, la vekiĝanta klera klaso estas scivolema, kaj multaj, kompreneble, ekinteresiĝis ankaŭ pri Esperanto, kiam ili eksciis pri ĝi.

Mi direktis mian agadon ĉefe al la tri lokoj, kie mi povis certigi kursgvidanton, ĉar sen tio mia propagando estus predikado en dezerto. La lokoj estis Delhi, Bombay kaj Santiniketan.

Entute mi faris 7 prelegojn pri Esperanto, kaj f-ino Parson unu. La gazetaro publikigis 12 artikolojn pri aŭ kun mencio de Esperanto, mi diskutis la temon kun verkistoj kaj aliaj intelektuloj kaj kelkaj oficialuloj. La rezulto estas la jena.

En Delhi f-ino Parson ekgvidis du kursojn dum 5 monatoj, kaj ĉe la fino fondis la Esperanto-Societon de New Delhi, kun ĉ. 20 membroj.

En Bombay mi gvidis kurson, kiun poste transprenis la du esperantistoj tie loĝantaj, la budhana monaĥo Rev. Anurudha (eks Rudolf Petri el Germanujo) kaj D-ro Rama Hegde, hindu. Tie ni fondis la Esperanto-Societon de Bombay, kun ĉ. 20 membroj.

En Santiniketan, kie funkcias la fama Internacia Universitato fondita de Rabindranath Tagore, post mia prelego kaj aparta intervjuo kun la Rektoro, oni decidis enkonduki Esperanton kiel regulan studobjekton en tiun Universitaton. Gvidos la kurson s-no Lakšmisvar Sinha, la bone konata hinda Esperantisto, kiu antaŭ dudeko da jaroj vojaĝadis kaj prelegadis en Svedujo kaj aliaj landoj de Eŭropo.

Por eventuala kontakto, jen la adresoj de la du sekretarioj:

*D-ro Rama Hegde, 1 Rutton
Manor, Garden Road, Bombay 1.*

*Veerendra D. Adhiya, „Prerna”,
Satnagar, New Delhi-5.*

La du societoj estas bona, kvankam modesta bazo por Movado en Hindujo, kaj se baldaŭ alvenas aliaj laboremuloj, ili certe povos daŭrigi la laboron. Tiurilate, pluraj samideanoj skribis al mi, ke ili estus pretaj veni al Hindujo, kondiĉe ke ili ricevus salajron. Bedaŭrinde, je la nuna stato de la aferoj, UEA ne donas salajron, do la volontuloj devas estis personoj, kiuj povas sin vivteni.

Ĝis nun mia sola kunlaborantino estis f-ino Elsie Parson, kiu post dujara vojaĝado kaj laboro, dum kiuj ŝi gvidis kursojn en Saloniko, Istanbul kaj New Delhi, reiras hejmen. Mi esprimas ĉi tie al ŝi publikan dankon pro la sindona laboro.

Tibor Sekelj

U.E.A. ankoraŭ
bezonas

APOGANTOJN!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 296

La 1-an de aŭgusto 1957.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ por komparo, je la fino de julio 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	11189	13270
Individuaj membroj		
MJ	863	775
MA	4198	5302
MS	714	657
Pat.	9	5
DM	291	299
HM	54	52
JMJ	—	14
JMA	—	96
	6129	7200
	17318	20470

DELEGITOJ

Aŭstralio

Canberra FD (Religio: Katolikismo): S-ro Sandor Fulop, poŝtoficisto, 26 Bundeela St., Narrabundah.

Perth D.: S-ro John Finch, Box T 1752.

Belgujo

Bruselo VD: vakas.

Brazilo

Barra do Piraí D.: S-ro Edson Azevedo da Silva, elektristo, Str. D. Guilherme 10.

Baturité FD (Komerco): S-ro Fernando Airtton Lopes de Sousa, komercisto, Rua Sonador João Cordoiro, n. 238.

Itanhomi D.: S-ro Jatir Gonçalves Vieira, kuracisto, Avenida Juscelino Kubitschek s/n, Caixa postal 7.

Porto Alegre FD (Filatelo): S-ro Benjamin C. Camozato, dentkuracisto, „Edifício Caiçara” Ap. 21.

Britujo

Chatham (Kent) D.: vakas.

Bulgarujo

Pleven D.: S-ro Simeon Nikolov Ĉorbaĝiev, muzikpedagogo, str. Tabaxov 14. FD (muzika pedagogio): La D.

Gara Pordim D.: S-ro Mihail Nikolov, abelisto.

Sofia FD (Filatelo): S-ro Vasil Cankov, kontisto, str. Dim. Poljanov 22.

FD (Filozofio): S-ro Vasel Ĉoĉov, farĝiev.

FD (Geodezio): S-ro Vasil Peevski, profesoro universitata, str. Gogol 9.

FD (ĵurnalismo-radio): S-ro Violin Oljanov, ĵurnalisto, str. Jv. Vazov 17.

Varna FD (paco): F-ino Maria Saraliev, oficistino, ul. D. Kondov.

Ĉeĥoslovakujo

Bojkovice D.: S-ro Jan Tichon, librobindisto, Bojkovice 595.

Doksy D.: S-ro Václav Špúr., direktoro de ŝtatŝparkaso, Moskevská 453.

Havírov FD (gimnastiko, sporto): S-ro Oldrich Schwetter, instruisto de gimnastiko, blok 14/67, okres Ostrava.

Košice FD (instruado): S-ro Jozef Fischhof, profesoro, Národ povstania 24.

Krupka D.: S-ro Jaroslav Kopriva, teknikisto, Nádražní č. 365.

Partizánska Lupča D.: S-ro Miloš Rybín, razisto, N-o 193.

Prostějov FD (tibeta kaj ĉina lingvoj): S-ro Kamil Sedláček, inĝeniero, Kostelecká 11.

Strakonice D.: S-ro Miroslav Hebrych, razisto, Čelakovského 259.

Strážnice D.: D-ro Zdeněk Ducon, juristo, Smetanova 1.

Šlapanice D.: S-ro František Hort, tek. oficisto, Malinovského 52.

Ústí n/LB D.: F-ino Libuše Jonašová, financoficistino, Bělehradská.

Zidlochovice FD (porpaca laboro): S-ro Jarka Jaroslav Dittrich, librovendisto, J. D. Medlov p. Nêmčičky u Zidlochovic.

Francujo

Alès D.: S-ro Gabriel Lanoux, komercisto, 21 rue Jaisson.

Bischwiller FD (muziko): S-ro Frédéric Philippe Kiehl, muzikinstruisto, 10, rue de l'Eglise.

Cholet D.: S-ino Ellen Menard, 18 rue Saint Martin.

Leffrinkoucke FD (turismo-kulturo): S-ro Michel Mario Gaido, publicisto, Châlet Zamenhof.

Marseille VD.: S-ro François Carrigue, elementa lernejestro, 34, rue Vauvargues.

Niort FD (internacia korespondado): F-ino Marie Ducloux, pensiita instruistino, 2 rue du Clou Bouchet.

St. Brieuc D.: S-ro Robert Marais, vojaĝanta komerca reprezentanto, 26 rue Louis Jouvét.

Tourcoing FD (numismatiko): S-ro Marcel Delcourt, komerca direktoro, 37, rue du Chêne-Houpline.

Germanujo

Crailsheim D.: vakas.

Magdeburg D.: S-ro Franz Tischer, masonisto, Martinstr. 9/II.

München FD (poŝto): vakas.

Weiden (Oberpfalz) D.: S-ro Hans Stahl, poŝtoficisto, Pestalozzistr. 4/I. VD: vakas.

Wetzlar D.: S-ino Anneliese Bepperling-Wolff, mastrino, grosse Promenade 2a. FD (bestbredado): la D.

Hispanujo

Barcelona FD (katolikismo): S-ro José L. Aldeguer Jaén, instruisto, Torrente del Vidalet 42-1º-1a.

Italujo

Foligno D.: S-ro Cesare Cadario, pensiulo, strato Beghelli 16.

Siena D.: S-ro P. Giacinto Jacobitti, katolika pastro, S. Domenico.

Viareggio D.: S-ro Guido Billet, pensiulo stenografinstruisto, via Matteotti 166.

Jugoslavujo

Beograd FD (komercio): vakas.

Kaujiza D.: S-ro Ferenc Dongó, instruisto, Karadjordjeva 30.

FD (fajrobrigadaj aferoj): la D.

Zagreb VD: S-ro Vinko Skomina, pensiulo, Škrlečeva 31.

FD (terkulturo: selektado de plantoj): S-ino Gerka Bosiljevič, agronomia inĝeniero, Fiamina 4.

Kanado

Oakville D.: S-ro Rüdiger Eichholz, televidea teknikisto, ĉe Esperanto Press, Oakville.

FD (unitarismo): La D.

Kenjo

Eldoret D.: S-ro John Williamson, edukisto kaj bienposedanto, Box 476.

FD (kristanaj misioj): La D.

FD (orient-afrikaj lingvoj): La D.

Kubo

Habana D.: vakas.

Nederlando

Haren FD (obstetriko): F-ino F. W. Boersma, akuŝistino, Onnerweg 11.

Pollando

Bedzin D.: S-ro Henryk Palica, komercisto, Aleja Spacerowa 10/16.

Olecko D.: vakas.

Svislando

Genève D.: vakas.

Goldau D.: S-ro Hans Wagner, fervoja oficisto, Centralstrasse.
FD (fotografio): la D.

Usono

Brookfield III D.: S-ro Frank J. Kovarik, pensiulo, 8748 Rockefeller Av.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

- 538 Thorvaldsen, S-ino E., Oslo, Norvegujo.
539 Vik, S-ino Bergljot, Kristlandsand, Norvegujo.
540 Raynor, S-ro G. D., Wellington, Novzelando.
541 Seubring, S-ro G., Pietersburg, Sudafriko.
542 Akerberg, S-ro B., Hägersten, Svedujo.
543 Asp, S-ro B., Johanneshov, Svedujo.
544 Lind, F-ino Estrid, Stockholm, Svedujo.
545 Barbieri, S-ro Rubens A., Montevideo, Urugvajo.
546 Borthagaray, S-ro Felix O., Paysandu, Urugvajo.
547 Tato, S-ro Helios, Montevideo, Urugvajo.
548 Belinfante, D-ro F. J., West Lafayette, Usono.
549 Harvey, S-ro E., Melbourne Vic., Aŭstralio.
550 Laid, S-ro L., via Liverpool N.S.W., Aŭstralio.
551 Stempel, F-ino Ottilie, Subiaco, Aŭstralio.
552 Taylor, S-ro F. V., Albury, Aŭstralio.
553 Fabjan, S-ino Erna, Bregenz, Aŭstrujo.
554 d'Amorim, D-ro Nid Dutra, Salvador — Baía, Brazilo.
555 Carvalho, S-ro A., Bebedouro, Brazilo.
556 Castaneira, S-ro Jolio, Bom Sucesso, Brazilo.
557 Santos, S-ro H. Pereira dos, Sao Paulo, Brazilo.
558 Souza, S-ro J. Martins de, Juazeiro, Brazilo.
559 Verde, D-ro D. Lima, Ceará, Brazilo.

- 560 Zamora, S-ro Ary, Porte Alegre, Brazilo.
561 Zuhlke, S-ino Clara Alvina J., Rio de Janeiro, Brazilo.
562 Hoyle, S-ro James, Manchester, Britujo.
563 Lapenna, Prof. D-ro Ivo, Wembley, Britujo.
564 Manolov, S-ro Hristo, Tirnovo, Bulgarujo.
565 Nedevski, S-ro Peter, Sofia 2, Bulgarujo.
566 Paškulev, S-ro Hristo, Levskigrad, Bulgarujo.
567 Straka, S-ro P. Václav, Tatenice, Ĉeĥoslovakio.
568 Andresen, S-ro Søren, Fredericia, Danlando.
569 Schleicher, S-ro Ib., København, Danlando.
570 Bador, F-ino Yvonne, Tarbes, Francujo.
572 Lepeintre, S-ro R., Nantes, Francujo.
573 Bitterling, D-ro H., Göttingen, Germanujo.
574 Schulz, S-ro Paul, Gelsenkirchen-Buer I, Germanujo.
575 Marqueta, S-ro A. P., Zaragoza, Hispanujo.
576 Mateu, S-ro Juan Pico, Pedralba, Hispanujo.
577 Taccani, D-ro Leandro, Milano, Italujo.
578 Garnier, S-ino M., Casablanca, Maroko.
579 Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando.
580 Henriques, S-ro Horácio de Jesus, Nampula, Port. Or. Afriko.
582 Holmström, S-ro Arvid, Silverhöjden, Svedujo.
583 Olsson, F-ino Agda, Göteborg, Svedujo.
584 Benko, S-ro Adalberto, Montevideo, Urugvajo.
585 Catalono, D-ro Miguel, San Isidoro, Argentino.
586 Iglesias, S-ro Eugenio, Buenos Aires, Argentino.
587 Repini, S-ro Gino Luis, Caseros, Argentino.

- 588 Newell, S-ro L. N. M., Largs Bay, Aŭstralio.
589 Prewett, S-ro J. N., Rochester, Aŭstralio.
590 Albukuerque, S-ro Jaime Ferreira de, Pirassununga, Brazilo.
591 Barbosa, S-ro Altamir de Jesus, Pelotas, Brazilo.
592 Câmara, S-ro Romeu, Olinda, Brazilo.
593 Cunha, S-ro J. B. Oliveira, Rio de Janeiro, Brazilo.
594 Flores, D-ro Alberto, Volta Redonda, Brazilo.
595 Gouveia, S-ro Ricardo L., Rio de Janeiro, Brazilo.
596 Hentschel, S-ro Noberto W., Porto Alegre, Brazilo.
597 Melo, S-ro J. Olívio de, Rio de Janeiro, Brazilo.
598 Oliveira, S-ro J. Francelino de, Baturité, Brazilo.
599 Real, S-ro Pedro, Paranavai, Brazilo.
600 Santana, Kap. Jorge Firmino de, Juiz de Fora, Brazilo.
601 Verde, D-ro E. Villa, Sta Tereza, Brazilo.
602 Vianna, S-ro Inq. Lincoln Martins, Belo Horizonte, Brazilo.
603 Bridger, S-ro Henry J., Bexleyheath, Britujo.
604 Crabtree, S-ro E. P., Huddersfield, Britujo.
605 Hilder, S-ro Edward C., Bideford, Britujo.
606 Rossetti, S-ro R., Alvechurch, Britujo.
607 Haba, S-ro Frantisek, Vizovice, Ĉeĥoslovakio.
608 McCulloch, S-ro Robert C., Toul-Rosieres AB, Francujo.
609 Balmas, D-ro Federico, Torino, Italujo.
610 Vries, S-ro A. de, Soest, Nederlando.
611 Pêche, F-ino P., Blieskastel, Sarlando.
612 Carrfors, S-ino Solveig, Bromma, Svedujo.
613 Enstrom, F-ino M. L., Johanneshov, Svedujo.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 31-a de julio 1957

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	2016	2950	146,32
2.	Danlando	1910	2708	141,78
3.	Nederlando	4894	5422	110,78
4.	Italujo	3620	3910	108,01
5.	Francujo	6575	7084	107,74
6.	Jugoslavio	3563	3715	104,26
7.	Germanujo	6515	6635	101,84
8.	Finnlando	2687	2725	101,41
9.	Svislando	1910	1935	101,30
10.	Hispanujo	2092	2065	98,71
11.	Svedujo	6895	6580	95,43
13.	Belgujo	1952	1823	93,39

13.	Britujo	7351	6740	91,69
14.	Brazilo	6985	5675	81,25
15.	Norvegujo	2113	1445	68,39

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Aŭstralio	1025	1188	115,90
2.	Aŭstrujo	1400	1485	106,07
3.	Sudafriko	230	225	97,83
4.	Novzelando	942	880	93,42
5.	Argentino	745	695	93,29
6.	Japanujo	1210	1105	91,32
7.	Portugalujo	580	520	89,66
8.	Urugvajo	325	290	89,23
9.	Kanado	500	440	88,—
10.	Izraelo	290	230	79,31
11.	Islando	405	295	72,84
12.	Maroko	1061	450	42,41

614 Hammarstrand, S-ino E. M., Vimmerby, Svedujo.

615 Sparks, Pastro Robert, Avon, Usono.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

R. Barta 3,40 gld.; D-ro F. Szilagyi 38,60 gld.

DONACO AL A.P.O.

J. Vidack 11,40 gld.

LA OFICEJA ILARO DE U.E.A.

Dua listo de kontribuintoj por helpi al modernigo de niaj oficejoj: P. M. Mabe-soone, R. Slot, J. Telling, H. Groendijk, H. Bakker, S-ino J. A. Döbken-Mulder, W. Laederach, P. Bouvier, R. Zollinger, W. Voirol, O. Walder, Esp. grupo Vevey.

Al ĉiuj donancintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas
Direktorino G.O.

ANONCETOJ

Londona Gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, London W.9, Anglujo, Telefono CUNningham 4487/N.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Britujo, Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Bulgariujo, Finnlando. Skribu, indikante **viajn** sekson, aĝon, profesion al: Daniel LUEZ, LAON (Aisne), Francujo kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Kristana kulturlaboro en nia tempo, aktuala verketo de sveda ĉefredaktoro, radiokomentisto kaj beletra historiisto Erik Hj. Linder, estas ĵus aperigita en bona traduko. Konvena por individua studo kaj grupa diskuto. 32 p. por 1 sv.kr. aŭ 2 resp.kup. afrankite ĉe Esperanto-Missionen, Klackavägen, Nora stad, Svedujo.

Michail Nikolov, gara Pordirn, Bulgariujo, deziras korespondi kun abelistoj de ĉiuj landoj kaj ricevi katalogojn, ĵurnalojn ktp. por abelisto.

Junularo Centro „Stella” serĉas en la tuta mondo gejunulojn, kiuj dezirus krei similajn centrojn en sia lando. Celoj: Helpo al netaŭge loĝatoj, al junaj geedzoj, al naskintaj fraŭlinoj, al rifuĝintoj, eltrovo de laboro por la junuloj, malfermo de junulrestoracioj je modestaj prezoj, diskonigo de Esperanto, ktp. Por ĉia informo, skribial: S-ro LAGRANGE

Henry, 81 rue de la République, DIEPPE Seine-Maritime, France.

Interesa turisma prospekto pri Fécamp senpage havebla. Skribu al ESSI, Fécamp, (Seine-Maritime), Francujo.

Josef Kozišek. Jihlava, Ĉeĥoslovakio. Poŝtoficejo interŝanĝas: poŝtmarkojn, poŝtilustr. kartojn, gazetojn. Certe respondas.

Antonio Khirer malnova Esp.sto (1912) ŝatus korespondi per il.Pk. kaj interŝanĝi Pm. el la tuta mondo. Khirer 1-ker Ālmos-u 2. NAGYKORÖS, Hungario.

En la proksima tempo mi eldonos novan grandan polan humoran revuon kaj mi proponas al ĉiuj esperantaj ĵurnalistoj, verkistoj, pentristoj kaj simplaj admirantoj de humoro — regulan kaj konstantan kunlaboradon. Nia redakcio bezonas: mallongajn spritaĵojn, anekdotojn pri famaj homoj, mallongajn gajajn rakontojn, originalajn naciajn proverbojn el la tuta mondo. Ni pagos nur en polaj zlotys, laŭdezire egalvalorajn en esperantaĵoj, eldonitaj en Pollando, abonoj de „POL-LANDO” ktp. Bonvolu skribi: Red. M. Niewiarowski. Kl. Zetkinstr. 21/5, Katowice, Pollando.

S-ro Kiyosi Negita, 160, Kudegaya-machi, Nishinomiya-City, Hyogo-Ken, Japanujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun tutmondaj gesamideanoj. Sendu 100-500 pm de via lando kontraŭ 100-500 pm de Japanujo, Koreujo, Ĉinujo, ktp.

24-jara fraŭlino Jeanette Sidorak el Pollando, Kamienica 167, kolo Bielska-Bialej, deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri filatelo, sporto, turismo, fotografado, filmo, moderna literaturo, ekzotika muziko kaj popoldancoj.

16-jara liceanino f-ino Irma Szull, Pollando, Wolomin k. Warsawy, ul. Warszawska 18 m. 5, deziras korespondi per belaj poŝtkartoj.

Geedziĝa oficejo „Svatka” feliĉege helpas al soluloj, diskrete kunigas geedzojn. Havigas kandidat(in)ojn el pli ol 10 landoj laŭdezire. Petu pliajn informojn kontraŭ unu respondkuponon (por Pollando pm. 1.55) al Geedziĝa Oficejo „Svatka”, Lodz, Piotrkowska 159. Represo petata. Oni korespondas en Esperanto, angla, franca, kaj germana.

Pollando. Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn tutmonde. Certe respondos. Roman Rutkowski, Bydgoszcz 1, Box 147.

Franklinvuloj: Uzu kaj diskonigu la facilan, efikan, sukcesan „Méthode Auto-didactique”! Sendu 980 frankojn al poŝtĉekkonto 555.35. Strasbourg: LIBRAIRE NOVA, Mulhouse (E).

Al ĉiuj 535 samideanoj, kiuj sendis esperantaĵojn je mia SOS en no. 9/56 de „Esperanto” (precipe el Britujo, Francujo, Svedujo kaj Usono) mi esprimas plej koran dankon, precipe al tiuj, kies adresoj mankis aŭ estis nelegeblaj. F. Slatynski, Oswiecim (Pollando).

Mi bezonas respondkuponojn. Pretas rekompenci per ĉiaj servoj kaj livero de esperantaĵoj. Hristo Tonev, str. P. Volo-32, Kolarovgrad, Bulgario.

Gramofondisko nerompebla: La Espero, Ĉeriz' Tempo, Al la Fontano Klara, Adiaŭ (Schubert). Piano kaj kanto. Yvette Mathy-Josse, Marguerite Santreuil, 1200 fr.fr. (inkl. afrankon), Ch. P. II 652-37, Porte Océane, 21, rue de Berne, Paris 8.

Deziras korespondi kun la tuta mondo. Temo: Baletoj, operoj, libroj, vojaĝoj, scienco. Interŝanĝas bildkartojn kun poŝtmarkoj sur bildflanko. Interŝanĝas ĉiujn poŝtmarkojn kvanto kontraŭ kvanto. Certe respondos. Skribu: Horsky, 361 P.O.B., London W.11, Britujo.

Mi pretas liveri esperantajn, polajn aŭ judajn librojn interŝanĝe por la no. 11-12 jul/aŭg. 1946, 13-14 sept/okt. 1947 de „Internacia Kulturo”. H. Holender, ul. Zolkiewskiego 18 m 6, Szczecin, Pollando.

Argentina Esperanto-Ligo, Casella Correo 44, Rosario, Argentino, serĉas korespondantojn por tutlanda kursanaro. Ni danke ricevos gazetojn kaj prospektojn por disdoni inter ili. Nepra respondo. Represo petata. Ĉiam validas.

Deziras korespondi kun tutmondo. Interesiĝas pri poŝtkartoj kaj diversa esp. propaganda materialo. Kajs Rudolf, ul. Opavska 75/82, Vitkov, Ĉeĥoslovakujo.

Hans Gäbler, ekspoŝtinspektoro, antaŭe Leipzig nun Rheinbischofsheim über Achern, okcident-Germanujo, salutas Esp.-amikojn, kun kiuj li antaŭe rilatis, korespondis; petas iliajn adresojn, ŝatus interŝanĝi leterojn, poŝtmarkojn, kun gekdoj en la tuta mondo. Korespondado estus ebla en Esp., franca, angla.

Nâtâraŭ Joan, str. Caramidarilov 116, Baia, Mare, Rumanujo, deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi sportrevuojn. Certe respondos.

La Filatelista Esperantisto reaperos. Sendu tekstojn por senpaga anonceto. Petu specimenon. Melo, 6 pl. J. Ferry, St. Etienne, Francujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj Alfred Mayer, Zeppelinstr. 35, (17a) Karlsruhe-West, Germanujo.

Kiuj volas gajni fidelan korespondanton, skribu al adreso: Alois Jakubec, Drahotuše, Ĉeĥoslovakio. Certe respondos. Interŝanĝas pm. kaj il. bildkartojn.

Ni petas la esperanto-societojn kaj la gesperantistojn de ĉiuj landoj sendu al ni bildkartojn, fotografaĵojn, pentraĵojn kaj aliajn materialojn, kiuj reprezentas naciajn kostumojn, popolajn kutimojn, morojn kaj festojn, ĉu post naskiĝo, fianĉiĝo aŭ edziĝo, ĉu je la renkontiĝo de novjaro k.a.; por la ekspozicio, aranĝota je la 15 oktobro k.j. Al ĉiuj sendontoj ni nepre respondos. Ni petas skribu al: Esperanto Societo „Vekiĝo”, P.kesto 60, Kolarovgrad-Bulgario.

Aperos antaŭ la Tago de la Libro (15a de decembro)!

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Verkoj de Chaucer, Spenser, Shakespeare, Milton, kaj multaj aliaj mondfamaj aŭtoroj en Esperanta traduko.

Redaktoroj:

WILLIAM AULD kaj RETO ROSSETTI

en kunlaboro kun plej kompetentaj tradukintoj pretigis la manuskripton, kiun eldonos

La Eldona Fakto de UEA

Ĉi tiun belan kaj valoran volumon 320-paĝan oni povas

antaŭmendi je favora prezo de nur 9 gld. (36 steloj)

MENDU HODIAŬ ĈE UEA!

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Se vi ankoraŭ ne aĉetis

la libron de Jean Ribillard, „Vagado sub palmoj”, mendu ĝin nun de UEA aŭ de via loka librovendisto. Vi certe ĝuos la spriton, simpation kaj viglan lingvaĵon de la aŭtoro, kiu estas iama oficiro en la franca Afrika Armeo. La riĉe ilustrita libro kostas 2.50 gld. aŭ 10 stelojn. Mendu ĝin hodiaŭ: vi certe tion ne bedaŭros.

VAGADO SUB PALMOJ

AL ĈIUJ SINDONAJ MEMBROJ!

Baldaŭ komenciĝos jam
la preparoj por Jarlibro 1958.

Helpu plibeligi ĝin!

Varbu, varbadu reklamojn por ĝi

POR FONDI **PERMANENTAN BIBLIO - EKSPOZICION** EN KENJO

mi bezonas donacojn de neuzitaj, malnovaj, eĉ antikvaj Bibliojoj en multaj lingvoj,
ĉefe eŭropaj kaj aziaj. Ĉu vi bonvolas serĉi tiajn en kestoj kaj sur ŝrankoj kaj sendi al

J. WILLIAMSON, Box 476, ELDORET, Kenya, Del. de UEA.

(UEA volonte rekomendas ĉi tiun interesan celon.)

GRAVA ALVOKO

Okaze de niaj famaj Decembraj Festoj, ĉiujare vizitataj de multaj portugaloj kaj eksterlandanoj, mi intencas fari atentindan Esperantan Ekspozicion kaj avide esperas ke komprenemaj gesamideanoj sendu al ni ĉiuspecajn Esperantaĵojn-gazetojn, poŝtkartojn, fotojn, turismajn prospektojn, librojn, afiŝojn, k.s. Ne sendu, mi petegas, politikaĵojn, kio malfavorus kaj malprofitigus nian laboron. Ĉiu sendinto ricevos bildkarton bele afrankitan el Madejro. Adresu ĉion al **S-ro M.M. LOURENCO DE GOUVEIA**, Delegito de Universala Esperanto Asocio, FUNCHAL-MADEIRA.